

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)



Delegita Reto ne siestas

Lee en Ĉinio

Debato pri finvenkismo

Nitobe:

Inspiranto de esenca simpozio

Enhavo

- 161 Delegita Reto: Grandaĝa servo ne siestas (Osmo Buller);
Evoluo de la delegitaro
- 162 Nitobe-simpozio: Unika eksperimento gajnas novajn amikojn
(Mark Fettes); La pioniro Nitobe (Ulrich Lins); Resumaj rekomendoj
- 164 Eksteraj rilatoj: Serĉe al subteno en Ĉinio
- 165 Nekrologo: Ada Fighiera-Sikorska (1929-1996) (Andrzej Pettyn)
- 166 Kotiztabelo de UEA por 1997
Instruado: Pasporto al la tuta mondo (Lusi Harmon)
- 167 Honoraj Membroj: Unuafoje virina plejmulto
Internacia Kongresa Universitato
- 168 Kulturo: Ne degeneras la librokulturo (István Ertl);
Furoraroj de la Kongresa Libro servo
- 169 Belartaj Konkursoj: Triumfoj italaj kaj svedaj; Rezultoj de
Belartaj Konkursoj de UEA 1996; En stacidomo (Mauro Nervi)
- 170 Someraj aranĝoj: Lingvo-instiga sperto por infanoj (Seán Ó Riain);
De post kolono (John Rapley)
- 171 El niĝeria malliberejo al Prago (intervjuo kun Víctor Nto Nto)
Korektoj al la Jarlibro 1996
- 172 Reagoj
- 173 Historio: Nepublikigita, sed oficiala (Jean Amouroux)
- 174 Recenzoj: *Apenaŭ papilioj en Bergen-Belsen kaj La floroj de l' krepusko* (Bruce Crisp); *Tena. Hejmo en Mezeŭropo* (Ulrich Becker)
- 175 Laste aperis
- 176 Forumo: Ni ne klopodu vendi ne finbakitan aferon
(Miroslav Malovec)
- 177 Loke – Persone – Fake
- 178 Ŝulco 90-jara (Franz-Georg Rössler)
- 179 Anoncetoj
- 180 Nekrologoj; Oficiala Informilo

Vi trovos

ĉefartikole detalan raporton de Mark Fettes pri la lingvopolitika Nitobe-simpozio (p.162-64), pruvinta en Prago ke “ni ne estas solaj [...] en klopodoj reformi la mondan lingvan ordon”. Se vi volas legi la kontribuojn mem, vi trovos ilin en la simpoziaj aktoj, aperontaj post kelkaj monatoj.

Pli simple ol reformi la mondan lingvan ordon (tamen tre laborige) estis reformi la Delegitan Reton de UEA. Kio rezultis el la ekapliko de nova regularo pri delegitoj? Raportas Osmo Buller (p. 161).

Ŝajnas ke Ziko M. Sikosek blovis en vespo-neston publikigante sian “For la Esperantan sektismon!” (jul.-aŭg., p.136). Plejparton de la leterrubriko kaj de “Forumo” (p. 172, 176) plenigas reagoj al lia debatiga teksto, kontraŭaj kaj poraj.

Laste, kompletiga noto al nia septembra artikolo pri la UK-inaŭguro: krom aliaj ambasadoraj salutoj, estis voĉlegita ankaŭ E-lingva saluto de la pola ambasadoro, Marek Pernal, kiu en 1987 partoprenis la jubilean Varsovian kongreson.

La kovrilo: Inazô Nitobe, sur foto kiu en nia revuo unue aperis en 1921.

ESPERANTO

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Redaktofinio: la 10-a de la antaŭa monato. **Fondita** en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910). **Establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: István Ertl.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 61; US\$ 35; GM 55; enoj 4320; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1940, 1/2 p. 1075, 1/4 p. 580, 1/8 p. 320, 1/16 p. 175. Movada rabato 50%. Ekstera-kovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Manuskriptoj: Se eble, akompanataj de komputila disketo 3,5-cola.

Adreso: Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: +31-10-436-1044.

Telefakso: +31-10-436-1751.

Elektronika poŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj: 

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la CO: Pasquale Zapelli.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Respubliko; ☎+82-53-950-5425 [of], +82-53-765-0880 [h]; ✉+82-53-950-6247 [of], +82-53-765-0881 [h]; ☐keast@soback.kornet.nm.kr.

Vicprezidanto (landa agado: Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Afriko; edukado, kulturo): s-ino Renée Triolle, 4, impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎+39-6-39-72-61-98; ✉+39-6-39-72-61-69; ☐mc8750@mclink.it.

Estrarano (financo, administrado): d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9, NL-7913 VV Hollandscheveld, Nederlando; ☎+31-528-341214 [h], +31-50-3613769 [of]; ✉+31-50-3613763 [of]; ☐a.f.de.geus@td.azg.nl.

Estrarano (eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa, Ont., Kanado K1N 7P6; ☎+1-613-565-9282; ✉+1-613-565-9279; ☐mfettes@magi.com.

Estrarano (landa agado: Orienta Eŭropo, Azio, Oceanio; informado): s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio; ☎+370-7-739776 [h], +370-7-209781 [of]; ✉+370-7-228616 [of].

Estrarano (faka kaj scienca agado; lingvo): prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71908 Israelo; ☎+972-8-264462 [h], +972-2-658-6860 [of]; ✉+972-2-658-4437 [of]; ☐amri@vms.huji.ac.il.

Grandaĝa servo ne siestas

La organizo de UEA estas vertikala kaj horizontala. La vertikala akso de nia tutmonda turbo estas regule lubrikata kaj ĝiaj eroj laŭbezzone freŝigataj. Sed kion pri la fama horizontala dimensio de UEA, la Delegita Reto?

Dum la Komitato, la Estraro, pluraj komisionoj kaj amaseto da komisiitoj estas ĉiun trian jaron elektataj, ankaŭ la Delegita Reto — kiu arigas pli ol 10-oblon de la membroj de la gvidorganoj — daŭre renoviĝas per aliĝoj, mortoj, eksigoj kaj eksigoj. Sed ĉio tio estis hazarda ĝis 1995, kiam la Komitato benis novan regularon pri delegitoj. Ĝi enkondukis 3-jaran mandaton ankaŭ por la delegitoj, celante tiel certigi bonan funkciadon de la plej fama servo de UEA. La Delegita Reto ja havas aŭreolon de legendo: apenaŭ estas informilo pri Esperanto kiu ne menciis ĝin. Unu el ĝiaj ekzistokialoj eĉ ligiĝas al informado, nome “pruvi al la skeptika mondo la utilon de la lingvo” (*Enciklopedio de Esperanto*, p. 106). Estis do ankaŭ pro honesteco ke oni reviziis la regulojn.

La nova regularo starigis al la ĉefdelegitoj kaj la CO timigan taskon. La tuta Delegita Reto devis esti rekonstruita kvazaŭ de nulo. Ĉiu malnova delegito devis plenigi novan demandilon por kandidatiĝi por 1996-1998. Pesimistoj pensis ke la Jarlibro 1996 estos maldika libreto, sed ili malpravis: la ĉi-jara adresaro ampleksas 84,5% de tiu antaŭ la reformo. De 2166 la delegitaro reduktiĝis al 1830. Konsidere la grandecan de la tasko kaj la kompare mallongan tempon, tio estas tre bona rezulto. Cetere, la paĝnombro apenaŭ malkreskis, malgraŭ la malpli granda delegitaro. Averaĝa delegito bezonas nun pli da linioj en la Jarlibro ol antaŭe, kiam la poŝtan adreson akompanis nur telefonnumero. Pli kaj pli da delegitoj estas atingeblaj ankaŭ telefakse kaj retpoŝte, kio faras la plej malnovan servon de UEA eĉ pli utila en la moderna mondo. Pri la utileco kaj aktiveco de la delegitoj atestas ankaŭ la enketo kiun la germana ĉefdelegito faris en 1995 inter siaj delegitoj (vd. sube).

Ŝanĝo kompare kun la antaŭa praktiko estas ke nun la fakdelegitojn aprobas la direktoro de la CO anstataŭ la ĉefdelegito. Tio celas i.a. pli facilan unuecigon de la faknomoj. Ĉar la akceptitaj fakoj troviĝas en la Jarlibro, mi malkaŝu ĉi tie la du fakojn kiujn ni prude rifuzis: “profetado” kaj “siesto”. Kvin delegitoj rifuzis re-kandidatiĝi proteste al tio ke ili trovis la regularon tro rigora. Iom da rigoro ja necesas por konservi la seriozecon de la afero, sed okaze de dubaj kazoj la decidon regas prudenta fleksebleco anstataŭ rigoreco.

El la enketo pri la agado de germanaj delegitoj en 1995:

- la delegitoj ricevis 2273 leterojn;
- 247 eksterlandaj gastoj vizitis ilin;
- ili mem uzis la Delegitan Reton 195-foje vizitante eksterlande;
- ili verkis 127 gazetartikolojn;
- radio aŭ televido intervjuis ilin 29-foje;
- ili ricevis 251 almozpetojn.

La plej grava kialo por demisioj estis aĝo aŭ sanstato — kelkaj eĉ ĝojis pri la ricevita ŝanco, ĉar ili kredis esti ĝismorte kondamnitaj al delegiteco. La plej bedaŭrinda kialo estis ĉagreniĝo pri almozpetoj kaj aliaj misuzoj, kiuj fariĝis vera plago en la lastaj unu-du jaroj. Ilia sekvo estis ankaŭ la neaperigo de la adresaro en la ĉi-jara Kongresa Libro. Serioza asocio devas protekti siajn membrojn, kaj tio povas postuli drastajn agojn.

Oni ne proklamis konkurson inter la landoj pri la honoro de la plej sukcesa rekonstruanto de la Delegita Reto. Se ni tamen konsideras la landojn kun minimume 20 delegitoj, ni povas distingi tri venkintojn. Kun 199 delegitoj Germanio forkonkeris de Brazilo la lokon de la plej delegitoriĉa lando. Kompare kun la nombro de delegitoj antaŭ la reformo, Svislando atingis la plej bonan rezulton, ĉar ĝia delegitaro kreskis 17,7%. Israelo venkas la konkurson pri la nombro de delegitoj kompare kun la nombro de individuaj membroj de UEA: 50% de la membroj (1995) tie estas delegitoj, dum la monda averaĝo estas 25,3% (30,4% en 1995). Gratulon al la ĉampionoj!

En Prago la ĉefdelegitoj starigis la celon pri 2000 delegitoj en la venonta Jarlibro. Ne estas riske profeti ke tio facile plenumiĝos. Sufiĉas ke ĉesu siesti la landoj kie oni realigis la revizion de la delegitaro malpli bone ol averaĝe. Kaj se vi mem ankoraŭ ne estas delegito, mi nun invitas vin! Petu la respondilon de via ĉefdelegito aŭ de la CO.

Osmo Buller

Evoluo de la delegitaro

	1995	1996	% el 1995	% el membraro
Germanio	213	199	93,4	32,7
Brazilo	217	184	84,8	37,0
Francio	166	137	82,5	20,2
Japanio	109	94	86,2	23,2
Usono	105	89	84,8	21,3
Britio	92	75	81,5	28,2
Italio	97	74	76,3	29,3
Finnlando	72	59	81,9	18,2
Nederlando	70	56	80,0	14,4
Hungario	61	50	82,0	39,7
Svedio	69	49	71,0	17,8
Hispanio	49	38	77,6	19,2
Ĉeĥio	46	37	80,4	46,3
Pollando	44	37	84,1	16,4
Israelo	35	35	100,0	50,0
Rusio	43	35	81,4	31,3
Belgio	53	29	54,7	14,7
Ĉinio	39	28	71,8	14,4
Danio	25	27	108,0	27,0
Kroatio	22	24	109,1	27,9
Norvegio	22	24	109,1	30,4
Jugoslavio	25	23	92,0	22,6
Argentino	25	22	88,0	42,3
Korea Resp.	26	22	84,6	34,9
Bulgario	25	20	80,0	41,7
Svislando	17	20	117,7	14,6
Aŭstralio	22	17	77,3	21,3
Nov-Zelando	24	15	62,5	37,5
Kanado	21	13	61,9	16,5
Togolando	24	10	41,7	21,3
Sumo/Averaĝo en ĉiuj landoj	2166	1830	84,5	25,3

Unika eksperimento gajnas n

**Ni devas malfermi niajn kongresojn.
El tiu simple esprimita konvinko de
la prezidanto de UEA evoluis unika ero
de la Praga UK: la Nitobe-Simpozio
de Internaciaj Organizaĵoj.**

La Simpozion ebligis subvencio de la neesperantista Japana Fondaĵo, kiu tiamaniere omaĝis la historian viziton de d-ro NITOBĖ Inazô, asista ĝenerala sekretario de Ligo de Nacioj, al la 13-a Universala Kongreso en Prago, 1921. (Malavare kontribuis finance ankaŭ Oomoto kaj Institucio Hodler.) Ĝi postulis amaseton da organiza laboro, inkluzive de kontaktoj kun dekoj da neregistaraj organizaĵoj kaj plej diversaj fakoj de Unuiĝintaj Nacioj, Unesko kaj Eŭropa Unio. La rezulto estis interesa, vigla, esperiga interŝanĝo de ideoj kun deko da nemovadanoj, ĉiuj iel ligitaj per sia fako al demandoj de la internacia lingvopolitiko.

Neeviteble la Simpozio devis solvi sian propran lingvopolitikan dilemon; ĝi faris tion per paralela uzado de Esperanto, la angla kaj la franca, kun samtempa interpretaĵo. Tio estis, kiel ĉiam, malperfekta solvo, kiu foje utilis por memori la partoprenantojn pri la realeco de lingvaj problemoj! Komence oni antaŭvidis la neceson limigi la aliron al invititaj kongresanoj, sed en la fino troviĝis seĝoj kaj kapaŭskultiloj por ĉiuj interesatoj, tiel ke kelkajn sesiojn ĉeestis pli ol cent homoj.

Egaleco estis ĉeftemo

La unuaj tri sesioj, po du horoj kaj duono, servis por esplori diversajn aspektojn de la subtemoj “Lingvopolitiko kaj lingva praktiko”, “Lingva diverseco kaj lingva



demokratio”, kaj “Lingvoj en transnacia edukado”; la kvara sesio enhavis rondatablan diskuton pri la konstruado de nova lingva ordo; fine la kvina, konkluda sesio celis ellabori rekomendojn. Evidente ne eblas ĉi tie adekvate resumi pli ol 12 horojn da prelegoj kaj diskutoj. Tamen eblas provi doni ian gustumon.

La unuan sesion enkondukis duonhora omaĝo al Nitobe, lumbilde vigligata de KOBAYASHI Tsukasa, kun postparolo de Ulrich Lins. El tiuj prezentoj evidentiĝis kiel la simpatio de Nitobe al Esperanto kongruis kun liaj dumvivaj klopodoj por la valoroj de la klerismo, do por saĝo kaj racio en la internacia sfero same kiel en la nacia. Cetere, dum la preparoj de la Simpozio malkovriĝis la originala raporto de Nitobe pri siaj spertoj ĉe la 13-a UK, kiu neniam eldoniĝis en sia tuto. UEA nun planas aperigi la integran tekston kadre de la simpoziaj aktoj.

La pioniro Nitobe

Ido de samuraja familio, NITOBĖ Inazô (1862-1933) apartenis al la fruaj disvastigantoj de la okcidenta scienco en Japanio. Studinte en Usono kaj Germanio, li deziris tuj transdoni la akiritan scion al la juna Meizigeneracio. Kio tamen distingis lin de aliaj samaĝaj intelektuloj, estis lia deziro samtempe peri al la mondo la ĉefajn karakterizaĵojn de la japana kulturo. Li verkis, krom *Busido* (1899), plurajn librojn kaj artikolojn, kiuj famigis lin kiel elstaran japanan internaciiston. Lia anglalingva verkaro, republikigita en 1972, ampleksas kvin volumojn kun po 500-700 paĝoj.¹

Post la unua mondmilito Nitobe frue bonvenigis la fondon de Ligo de Nacioj (LdN). Nomumita kiel asista ĝenerala sekretario, li komprenis ne nur kiom influas lingvouzo la funkciadon de LdN, sed ankaŭ ke la diskuto pri la lingva problemo rekte rilatas al la strebado por kreo de nova, paca mondordo. Pro tio estis signife ke Nitobe en 1921 partoprenis la 13-an Universalan Kongreson de Esperanto en Prago. Tie li diris interalie:

... nun, kiam Eŭropo suferas, Azio ne povas flankestari. La mondo estas tiel kunligita, ke tio[n], kion unu gajnas, la alia perdas. Ni estas ĉiuj kunligitaj per la miloblaj ligiloj de interamikeco, de perdo kaj gajno, de sufero kaj doloro. Ni finfine fariĝis *homoj* anstataŭ esti nur naciuloj. Kvankam ni ne devas forgesi tion, kion ni ŝuldas al niaj nacioj, ni devas samtempe ĉiam rememori, ke ekzistas aferoj eĉ super ili.²

Du observojn necesas noti: Jen estis aziano kiu donis apogon al Esperanto, lingvo naskita en Eŭropo. Kaj Nitobe en sia hejmlando estis konsiderata kiel brila stilisto anglalingva. Tia persono do deklaris sin simpatianto de Esperanto kaj zorgis ke estu kompilita raporto de LdN pri ĝia stato en la mondo.

LdN iom pridiskutis Esperanton, sed akceptis en septembro 1922 nur malfortigitan version de la raporto pri la atingoj de la Esperanto-movado, ĉefe pro la kontraŭstaro de la franca registaro, kiu timis (plian) malfortiĝon de la franca kiel lingvo de diplomatio. Sed ankaŭ aliaj registaroj deziris eviti ke LdN vere konformiĝu al sia nomo — ke ĝi evoluu al institucio superanta la naciajn suverenecojn, al organo de internacia demokratio kun eventuale eĉ komunika komunikilo.³

ovajn amikojn



Foto: Kongresa Fideismo

Humphrey Tonkin, Robert Phillipson kaj Jane Edwards en akcepto por Nitobe-simpozianoj.

Pri la temo "Lingvopolitiko kaj lingva praktiko" parolis Marie-Josée de Saint Robert, terminologo ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo. Ŝi precipe kontrastigis la celatan egalecon inter la angla kaj la franca ĉe UN kun la efektiva konduto de la stabanoj (anglalingvaj kaj franclingvaj), kiu enradikigas la superregadon de la angla. Egaleco estis la ĉeftemo ankaŭ de Mark Fettes, kiu analizis la diversajn manierojn laŭ kiuj la Esperanto-komunumo alfrontas la lingvajn diferencojn inter siaj anoj. Sekvis komentoj de Françoise Cestac, antaŭa asista ĝenerala sekretario de UN pri konferencaj servoj (t.e. ĉefe la lingvaj servoj), kaj Robert Phillipson, konata esploristo pri lingva imperiismo. Dum Cestac opinias la lingvan reĝimon de UN principe modela, kun nur iom da problemoj en la realigo, Phillipson atentigis

Nitobe en 1926 revenis el Ĝenevo al Japanio.⁴ De tiam li dediĉis siajn fortojn precipe al la interkompreniĝo de Japanio kaj Usono. Li ne ĝisvivis la pacifikan militon, sed kiam li mortis, en 1933,⁵ ne nur jam malboniĝis la japan-usonaj rilatoj, sed ankaŭ malkreskis la prestiĝo de Ligo de Nacioj.

Unuavide, do, la nomo de Nitobe ligiĝas kun du historiaj malsukcesoj. Ne estas mia tasko juĝi kiugrade la nuna ligiteco de Japanio kaj Usono malfrue utiligas la impulsojn donitajn de Nitobe. Sed certe restas aktualaj liaj pioniraj pensoj pri la graveco de funkciaj internaciaj organizaĵoj por la kreo de tutmonda konscio.

Ulrich Lins (Germanio)

NOTOJ

1. *The Works of Inazo Nitobe*. With an introduction by Yasaka Takagi. Vol. I-V. University of Tokyo Press, 1972.

2. *Esperanto*, vol. 17, 1921, p. 157.

3. Por resumo de la lukto kontraŭ Esperanto en LdN vd. mian libron *La danĝera lingvo* (Gerlingen, 1988), p. 61-70.

4. Je tiu okazo UEA nomumis Nitobe Honora Membro: *Esperanto*, vol. 23, 1927, p. 70. Lia dankletero: *Esperanto*, vol. 23, 1927, p. 101.

5. Vd. la nekrologon en *Esperanto*, vol. 29, 1933, p. 183.

pri la deeksteraj premoj al UN, favore al difinitaj lingvoj, kiuj malfaciligas egalecajn solvojn.

La dua sesio alportis pli konkretan enhavon, fokusitan al Okcidenta Eŭropo. Eŭropa parlamentano Olivier Dupuis, kiu rolas ankaŭ kiel sekretario de la Transnacia Radikala Partio, raportis pri la realaj problemoj spertataj en la Parlamento pro la multiĝo de laborlingvoj; li opinias ke pro tiaj spertoj eblus arigi plimulton da parlamentanoj por eksperimenta uzo de Esperanto. Hans Erasmus klarigis, surbaze de sia plurjara sperto en la Laborgrupo pri la Lingva Problemo en Eŭropa Unio, kial pli singarda kaj longdaŭra strategio necesas por certigi socian apogon al la enkonduko de Esperanto. Komentis Allan Wynne Jones, prezidanto de la Eŭropa Buroo por Malpli Uzataj Lingvoj, kaj Yvo Peeters, specialisto pri lingva juro; ambaŭ favoras pli vastan socian debaton pri la rilatoj inter ŝtataj lingvoj, minoritataj lingvoj kaj Esperanto.

Kontrastaj aliroj, similaj celoj

Pri la rilatoj inter lingvolernado kaj edukado parolis Joseph Poth, specialisto pri la lingvoprogramoj de Unesko, kaj KOBAYASHI Tsukasa, psikiatro kaj verkisto. Temis pri tute kontrastaj prezentoj: unuflanke pri edukaj projektoj ellaboritaj en privilegiita lingva medio, sen klara teoria bazo sed principe favoraj al pli da lingva egaleco; aliflanke pri la konkretaj spertoj de lingvaj malprivilegiuloj, kaj la povo de Esperanto malfermi fenestron al la mondo. En la komenta parto, radikalajn solvojn al la lingva malegaleco rekomendis Tove Skutnabb-Kangas, konata pledanto por la lingvaj kaj edukaj rajtoj de minoritatoj, kaj Mauro La Torre, kies profesia laboro inkluzivas la trejnadon de italaj E-instruistoj. Simile al la opinioj en la antaŭa sesio, ambaŭ rigardas Esperanton kiel parton de pli vasta strebo por plidemokratiigi la lingvan ordon.

Tiu nova lingva ordo estis la ĉeftemo de la kvara sesio. Tre diversa diskutantaro interŝanĝis spertojn kaj ideojn, inter si kaj kun la ceteraj ĉeestantoj. Efektive, eĉ la komuna subteno al la koncepto de neŭtrala internacia lingvo ne sufiĉis por trovi koherigan fadenon en la kontribuoj de Humphrey Tonkin (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo), DEGUCHI Kyotaro (Oomoto), Farhad Pirmoradi (Bahaa Internacia Komunumo), Reinhard Selten (ekonomikisto), Helmar Frank (Akademio Internacia de la Sciencoj) kaj Marino Busdachin (Transnacia Radikala Partio). Tamen, la diskuto utile reliefigis la kompleksecon de transiro de unuopaj, instituciaj uzoj de Esperanto al pli vasta socia uzado. Kiel poste sugestis UEA-prezidanto Lee Chong-Yeong en siaj konkludaj komentoj, tio liveros fruktodonan temon por estonta simpozio.

Plej drama estis la lasta kunveno, kiu, malgraŭ la malfrua horo, retenis almenaŭ sepdekon da partoprenantoj. Phillipson esprimis sian miron: Estas preskaŭ senprecedenca sperto por mi ke tiom da homoj pretas diskuti pri lingvopolitiko dum du horoj vespere post jam longa dumtaga programo! Tra la vespero, unu post la alia, la ceteraj gastoj parolis simile pri siaj pozitivaj impresoj. Ekde la inaŭguro mi sentas min hejme, diris Cestac, tiel dementante la oftan sugestis UEA-prezidanto Lee Chong-Yeong en siaj konkludaj komentoj, tio liveros fruktodonan temon por estonta simpozio.

Serĉe al subteno en Ĉinio

Nur tri semajnoj post la fino de la Praga UK, la agema UEA-prezidanto LEE Chong-Yeong faris dektagan viziton al Ĉinio.

Partopreninte la 1-an Azian kongreson de Esperanto en Ŝanhajo (21-25 aŭg.), Lee rendevuis la prezidanton de la Konstanta Komitato de la Ŝanhaja Popola Parlamento, YE Gongqi. Ĉe la rendevuo, Ye promesis ke li forte subtenos Esperanton kaj konsentis esti nomata “Amiko de Esperanto”.

Responde al la peto de Ĉina Esperanto-Ligo, post la Azia Kongreso Lee flugis al Pekino, kie li rendevuis kelkajn altrangulojn de la ĉina registaro. Ĉe la ministerio de edukado, li renkontis ties direktoron de eksteraj aferoj, JIANG Miaorui. Lee proponis ke la edukministerio subtenu eksperimentan projekton pri la propedeŭtika valoro de Esperanto. Direktoro Jiang konsentis pri la celo de la eksperimento, kaj promesis ke la registaro subtenos la projekton, se Ĉina E-Ligo trovos lernejon pretan por tia instruado.

La ĉina ministerio de eksteraj aferoj decidis ke ĝi uzos ekde la 1-a de septembro nur la ĉinan lingvon en siaj gazetaraj konferencoj, sen la ĝisnuna anglalingva traduko,

ĉar “kiam iu nacio estas respektata internacie, estas nature ke ankaŭ ĝia lingvo estu respektata” (laŭ redaktora artikolo de *Renmin Ribao*, organo de la Ĉina Komunista Partio). Rendevuante vic-ministron MA Jinru, estron de la ŝtata buroo de alilandaj ekspertoj, Lee interŝanĝis kun li opiniojn pri tiu decido kaj pri ĝia influo al la nuna internacia lingva ordo. Lee petis ke la ĉina registaro subtenu la strebojn al konstruado de nova internacia lingva ordo. La vic-ministro montris bonan intereson pri Esperanto kaj sugestis al Lee ke UEA invitu la ĉinan ambasadoron ĉe UN al kunvenoj kiujn ĝi organizos en Novjorko.

Lee renkontiĝis ankaŭ kun ZHAO Changqian, vicprezidanto de Ĉina Fremdlingva Eldongrupo — kiu regas la tutan fremdlingvan eldonadon en Ĉinio, inkluzive de *El Popola Ĉinio* — kaj kun LI Dan, vicprezidanto de Ĉina Radio Internacia, kiu elsendas Esperanto-programon trifoje ĉiutage. Ambaŭ eminentuloj promesis subtenon al Esperanto, kaj LI diris ke raportistoj de ĈRI partoprenos la venontan UK-on en Adelajdo. Ĉe Radio Pekino Lee respondis en “gazetara konferenco” al aŭskultantoj de la Esperanto-elsendo.

La tuta programo de LEE Chong-Yeong estis bone planita kaj prizorgata de Ĉina Esperanto-Ligo, kies prezidantino estas TAN Xiuzhu, kaj de DAI Songen. ★

La fina diskuto fokusiĝis al du demandoj: difini la komunajn konvinkojn de la partoprenantoj, kaj fiksi la prioritatojn por posta agado. Resumon de la ĉefaj konkludoj vi trovos ĉi-sekve. Laŭ laborprogramo ankoraŭ ne definitiva, sed jam ekdiskutita dum la kongreso, la sekvoj inkluzivos seminariojn en Novjorko kaj Bruselo, kaj pli oftan kaj intensan rilatadon kun la Eŭropa Buroo por Malpli Uzataj Lingvoj kaj aliaj organizaĵoj kaj esplorcentroj. (Krom tiuj jam menciitaj, ankaŭ la Monda Asocio de Mondfederistoj kaj de la Internacia Ligo de Virinoj por

Paco kaj Libereco sendis reprezentantojn al la Simpozio.) La simpoziajn konkludojn, kune kun konciza raporto, UEA vaste diskonigos inter organizaĵoj internaciaj kaj lingvopolitikaj fakuloj. Ankaŭ la aktoj de la Simpozio aperos post kelkaj monatoj, kun ĉiu kontribuo en la originala lingvo kaj resumo en la du aliaj laborlingvoj. Ili estos mendeblaj ĉe la Libroservo.

Kelkaj pliaj konkludoj

Kion la Simpozio atingis? Ĝi gajnis por ni kelkajn bonajn kaj utilajn amikojn kaj kunlaborantojn; ĝi vekis atenton ĉe diversaj organizaĵoj kies horizonto kutime ekskludas Esperanton; ĝi helpis iom pliprofundiĝi nian memkomprenon kaj strategian pensadon. El ĉiuj rezultoj, tiu lasta povas esti la plej grava. Jen la sekvoj kiujn mi mem ŝatus vidi: Unue, la Simpozio firmigu nian konvinkon ke Esperanto estas aktuala kaj grava socia temo, kiel tion esprimas ekzemple la Manifesto de Prago. Due, ĝi kuraĝigu nin elserĉi tiujn homojn kiuj pro siaj propraj okupoj kaj konvinkoj estas pretaj serioze diskuti kaj kunlabori kun ni. Trie, ĝi spronu nin pliprofundiĝi nian komprenon pri la ligoj inter Esperanto kaj aliaj movadoj, lingvoj kaj sociaj evoluoj.

Ni ne estas solaj. En klopodoj reformi la mondan lingvan ordon, aroj da homoj laboras samdirekte kiel ni, ofte eĉ ne sciante la nomon Esperanto, same kiel ni ofte ne konas aŭ komprenas ilian laboron. Transponti tiujn dividojn estas unu el la ĉefaj taskoj kiujn ni frontu en la nun pridiskutata Kampanjo 2000. Se ni plenumos tiun taskon, post kelkaj jaroj ĉi tiaj kunvenoj ne plu impresos nin per sia nekutimeco: ili estos esenca, vigla kaj populara parto de nia movada vivo.

Mark Fettes

Resumaj rekomendoj

1. Necesas tutmonda debato pri la konstruado de justa, efika kaj ekonomie prudenta lingva ordo. Individuoj kaj organizaĵoj kiuj laboras por socia justeco loke, naciskale aŭ tutmonde, serioze priatentu la konsekvencojn por sia laboro de lingvaj diferencoj kaj lingvopolitikoj, kiel ankaŭ la implicojn de siaj propraj prilingvaj politiko kaj praktiko.
2. Stabila kaj vivinda lingva ordo inkluzivos jenajn trajtojn:
 - a. la konservadon de lingva kaj kultura diverseco;
 - b. la enradikigon de lingvaj homrajtoj, inkluzive de adekvata edukado en la denaska lingvo kaj efika instruado de aliaj lingvoj;
 - c. altkvalitan, reciproke, vaste alireblan lingvan komunikadon inter grupoj malsamkulturaj kaj malsamlingvaj.
3. Urgas ke ĉie kie diskutiĝas la rimedoj por realigi ĉi tiujn celojn, esperantistoj kaj aliaj klopodu certigi la seriozan konsideradon de Esperanto, t.e. komprenon pri ĝia nuna funkciado kaj pritaksadon de ĝia potenciala aplikado.
4. Organizaĵoj tiufake kompetentaj kunlaboru por starigi internacian dokumentan centron pri lingvopolitiko, por plivastigi la esplorojn sur tiu kampo, kaj por stimuli kleran debaton pri nia lingva estonteco je ĉiuj niveloj de la socio.

Ada Fighiera-Sikorska (1929-1996)

La forpaso de Ada Fighiera-Sikorska por multaj esperantistoj, kiuj ne sciis pri ŝia nekuraĝebla malsano, estis ŝoko. Ja ankoraŭ tute antaŭ nelonge oni vidis ŝin vigla, bonhumora, energiplena meze de la kongresanaro en Tampere. Tamen la malsano kiu antaŭ jaroj ŝajne malaperis post sukcesa operacio, revenis kun duobla forto, por definitive detruĝi ŝian organismon.

La vivovojo de Ada sufiĉas por plenigi kelkajn dikajn librojn.¹ En 1939, loĝante en Lvovo kiel 10-jara knabineto, ŝi spertas la kruelaĵojn de la milito. Pli poste ŝi pasas tra la sovetiaj siberiaj punlaborejoj, kien — kiel filinon de pola generalo — rusoj devige sendis ŝin kune kun la patrino kaj fratinon. Dume en 1940 la patro forpasas en Starobielsk, murdita de NKVD-anoj,² sekvanse la sorton de miloj da polaj oficiroj bestece murditaj tiutempe en Katyń kaj aliaj lokoj. Poste, kun la armeo de generalo Anders ŝi sukcesas forlasi Sovetunion, kaj tra la Proksima Oriento ŝi atingas Anglion. De tie — post la militfino — ŝi revenas en la patrujon.

La filmo pri Ada ruliĝas pli kaj pli rapide. La studado en la Universitato de Vroclavo. La laboro en libroeldonejo en

Varsovio. Kaj fine la ekkono de Esperanto. Ŝi tiam ne antaŭvidis ke ĝi fariĝos tiom grava en ŝia vivo, ankaŭ en la familia, ke el la kunlaboro kun la Konstanta Kongresa Sekretario de UEA, Gian Carlo Fighiera, en 1958-59 naskiĝos profunda amo kaj multjara geedzeco.

En marto 1959 oni dungas ŝin en Pola Radio, kie kun Jerzy Uśpieński ŝi kunkreas la organizan kaj programan bazon de la estonta Esperanto-redakcio. Sed post la edziniĝo Ada forlasas Pollandon kaj sekvas la laborvojon de la edzo, kaj fine en 1962 ŝi transprenas de Teo Jung la eldonadon kaj la redaktadon de *Heroldo de Esperanto*. Laŭvice ŝi loĝas en Bruselo, Madrido kaj laste en Torino. Daŭrigante la redaktolinion de Teo Jung ŝi tamen evoluigas ĝin, ĉiam klopodante bone servi la internacian E-movadon ne nur perante informojn, sed ankaŭ diskonigante valorajn iniciatojn kaj per tio inspirante al la esperantistaro modernajn laborformojn necesajn en la ŝanĝiganta mondo.

Verŝajne mi ne riskas dirante ke ŝi apartenis al tiuj movadaj ĵurnalistoj kiuj mem ne kaŭzis konfliktaĵojn, sed ĝuste ĉiam klopodis forigi streĉitecojn, se tiaj aperis. Tia ŝi estis kiam ŝi laboris en Pola Radio kaj agis en

Pola E-Asocio. Dum la tuta laborperiodo en *Heroldo* ŝi klopodis servi la objektecon kaj samtempe reprezenti sendependan opini-esprimadon, kio montriĝis i.a. per kelkfoja apero en *Heroldo* de kritikoj ekz. pri la financelpolitiko de UEA. Sed ĉar ĉio ĉi fontis el sincera strebado al la perfekteco de nia ĉefa E-organizaĵo, verŝajne pro tio en 1994 la Komitato de UEA atribuis al ŝi la rangon de Honora Membro. Cetere samjare ŝi ricevis la prestiĝan FAME-premion.

Ŝi estis la unusola redaktoro de *Heroldo de Esperanto*, zorganta pri la redaktado, enpaĝigado, korespondado kun legantoj kaj kunlaborantoj, administrado ktp. Por realigiti tian amason da taskoj oni devas havi eksterordinaran manaĝeran talenton, internan memorganizecon. Tian havis Ada.

Skribante pri ŝi oni ne povas forgesi ke dum ŝia 35-jara laboro en *Heroldo* ŝi ankaŭ komencis eldoni E-librojn; la plej lastan — lernolibron de Esperanto por germanlingvanoj de T. Dahlenburg — ŝi ankoraŭ vidis antaŭ la morto. Kelkaj el la *Heroldo*-libroj, kiel ekz. *Paŝoj al plena posedo*, fariĝis furoraj titoloj. Ŝia granda merito estis disponigo de *Heroldo* al orient-eŭro-



Ada Fighiera-Sikorska transprenis de Teo Jung, en 1962, respondecon kiun ŝi fidele plenumis dum 35 jaroj por la bono de la tuta esperantistaro.

panoj en la periodo kiam la transpago-problemoj tie estis malfacile venkeblaj. Ŝi ĉiam estis preta doni intervjuojn al nacilingvaj amaskomunikiloj, kaj da ili — diverslande — aperis proksimume 1000!

La deklaro de Gian Carlo Fighiera, sendita al Pola Radio, ke li daŭrigos la laboron de Ada, esperigas pri la estonteco de la gazeto. Kaj tio estas iaspeca konsolo en la ege trista momento de la adiaŭo al Ada. Bone ke en ĝusta momento antaŭ 35 jaroj ŝi transprenis la redaktadon de *Heroldo de Esperanto*. Tio estis granda gajno kaj por la movado kaj por la Esperanta ĵurnalismo. Oni neniam forgesu tion. Omaĝon al ŝia memoro!

*Andrzej Pettyn*³ (Pollando)

NOTOJ

1. Ŝi verkis du librojn: en Esperanto *De tajgo al minaretoj* (1991), kaj proksimume samenhavan sed pli vastan en la pola lingvo.

2. NKVD: "Popolkomisarejo pri Internaj Aferoj", nomo de la sovetia sekreta polico de 1934 ĝis 1946.

3. Andrzej Pettyn estis eltrovita de Ada Fighiera-Sikorska en 1958 dum ŝia prelego pri Esperanto en la junulara medio de Varsovio; ankaŭ estis ŝi kiu invitis lin kiel junan studenton en aprilo 1959 komenci sian kunlaboron kun Pola Radio.

KOTIZTABELO DE UEA POR 1997

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Argentino/guldeno	8	20	50	30	20	100
Aŭstralio/dolaro	12	31	78	47	28	156
Aŭstrio/ŝilingo	100	250	630	400	240	1260
Belgio/franko	300	740	1850	1180	700	3700
Brazilo/guldeno	8	20	50	30	20	100
Britio/pundo	6	16	39	24	15	78
Bulgario/guldeno	8	20	50	30	20	100
Ĉeĥio/krono	150	350	900	550	350	1800
Danio/krono	55	140	350	225	130	700
Finnlando/marko	45	110	270	170	100	540
Francio/franko	50	120	310	200	120	620
Germanio/marko	14	36	89	57	34	178
Greklando/drakmo	1500	3700	9300	5900	3600	18 600
Hispanio/peseto	900	2200	5500	3500	2100	11 000
Hungario/forinto	750	1900	4800	2900	1750	9600
Irlando/pundo	6	14	36	23	14	72
Islando/guldeno	16	40	100	60	36	200
Israelo/guldeno	13	33	82	49	29	164
Italio/liro	13 000	33 000	82 000	52 000	31 000	164 000
Japanio/eno	1100	2900	7200	4300	2600	14 400
Kanado/dolaro	13	32	81	49	29	162
Korea Resp./guldeno	13	32	79	47	28	158
Nederlando/guldeno	16	40	100	64	38	200
Norvegio/krono	60	160	390	230	140	780
Nov-Zelando/dolaro	15	38	95	57	34	190
Pollando/guldeno	8	20	50	30	20	100
Portugalia/eskudo	1000	2500	6200	3900	2400	12 400
Rusio/guldeno	8	20	50	30	20	100
Slovakio/krono	150	400	1000	600	350	2000
Sud-Afriko/guldeno	14	36	90	54	32	180
Svedio/krono	70	170	430	275	170	860
Svislando/franko	12	31	78	47	28	156
Usono/dolaro	10	24	60	36	22	120
TARIFO A/guldeno	11	26	66	40	24	132
TARIFO B/guldeno	8	20	50	30	20	100

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgio laŭ Belgio; San-Marino laŭ Italio.

TARIFO A: Honkongo, Malto, Singapuro, Tajvano.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

Por ĉiu validas la nuna loĝlando. La kotizoj validas por la kalendara jaro.

- MG:** Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado
- MJ(-T):** Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo *Kontakto* sen plia abonpago)
- MA(-T):** Individua Membro-Abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo *Esperanto*
- DM:** Dumviva Membro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MA; ricevas la Jarlibron, la revuon *Esperanto*, kaj ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon *Kontakto*
- SA:** Simpla abono al la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA
- Kto:** Abono al la revuo *Kontakto*, sen membreco en UEA/TEJO
- SZ:** Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA)
- PT:** Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-T) por subteni TEJO (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon *Kontakto* kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO

INSTRUADO

Pasporto al la tuta mondo

De kvin jaroj la usona landa asocio ELNA planas fari Esperanto-kurson televidan. Lastatempe la planado firmiĝis, la teksto pretas; necesas nun solvi la financadon de la projekto.

Esperanto, pasporto al la tuta mondo taŭgos por dissendo per eduka aŭ kabla televido, celas plenkreskulojn, studentojn kaj gimnazianojn. Ĝi konsistas el 15 duon-horaj lecionoj rektmetodaj, sekve utiligeblaj ie ajn en la mondo.

La amuzaj lecionoj formas daŭran historion, kaj pro sia pretertempa eco estos uzeblaj senŝanĝe dum multaj jaroj.

Ĉefrolas la anoj de Familio Bonvolo: Georgo, greka filozofo; Filiso, klasika baletistino; Roberto, longdistanca kuristo; Jolando, ĵokeo; Heleno, avangarda skulptistino; kaj Donald, adoleska sed genia britmoda juĝisto.

La vidbendo estos farita ciferece, por ke ĝi poste estu adaptebla al kompaktdisko kaj interagada instruado. Laborkajeroj en Esperanto kaj en naciaj lingvoj akompanos la vidbendojn. Ni invitas helpantojn por adapti ilin al diversaj naciaj lingvoj. Niaj kunlaborantoj jam produktis prezentan reklambendon 15-minutan.

Pri la financado: Ĉiu leciono kostos 20 000 usonajn dolarojn. Ni celas kolekti \$80 000 antaŭ printempo 1997. Tiam ni filmos la unuajn kvar lecionojn kaj dissendos ilin al ĉiuj antaŭmendintoj. Antaŭmendoj kostas \$75 por la 4, aŭ \$250 por la 15 lecionoj. Poste ni starigos novan subten-varban kampanjon por filmi la sekvantajn lecionojn. Nia celo estas finprodukti la tuton ene de tri jaroj.

Por plene financi la tutan projekton ni devas peti helpon de malavaraj mecenatoj. Kaj tion ni kuraĝe, eĉ aŭdace, faras. Ni hastas certigi ke neniu ricevas monan profiton. Nia unua deziro estas provizi la movadon per profesi-nivela vidbenda instrumaterialo.

Donacojn al la projekto bonvolu sendi al: ELNA – Vidbenda Projekto, Box 1129, El Cerrito CA 94530, Usono, aŭ UEA-konto “nmvm-n”.

Lusi Harmon, Komisiito

☎+1/510/653-09-98; ☎653-14-68;

✉elna@netcom.com

Unuafoje virina plejmulto

La movadaj kronikoj registros: la unuan fojon okazis ke en iu jaro preskaŭ ĉiuj novaj Honoraj Membroj estis virinoj.

Marie BARTOVSKÁ (1912), Ĉeĥio. Ŝi volis iĝi instruisto, sed pro ŝia miopeco la lernejo rifuzis ŝin. Ŝi eklaboris en tolaĵfabriko, sed poste ŝi sukcesis eniri komercan lernejon. Esperanton ŝi lernis en la 30-aj jaroj. Ŝi aktivis en pluraj kluboj, kaj en 1951 ŝi mem fondis klubon en Frýdek Místek, kiun ŝi motoras ĝis nun. Ŝi multe instruis, kaj en 1965 iniciatis ĉiumonatan “Kafejon Esperantan”, kiun ŝi plu gvidas. Sperta pri la terminologio de teksindustrio, ŝi kontribuis tiufake i.a. al PIV. Bartovská estas konata aktivulino en sia lando, longtempa delegito de UEA, honora membro de Ĉeĥa E-Asocio. Ŝi neniam okupis centran movadan postenon, sed ŝi estas modelo de tutviva sindediĉo al lingvo kiu fariĝis universitato de ŝia vivo.



Belka BELEVA (1927), Bulgario. Esperantistiĝis en 1957. Profesia aktorino, kunfondinto de Bulgara Esperanto-Teatro. Ekde la unua prezentado de BET (1958) ŝi seninterrompe aktivas sur la Esperanta teatra scenejo. Krom en BET, ŝi partoprenis ankaŭ en Internacia Arta Teatro. Ŝi aktoris en dek naciaj kongresoj de Bulgara E-Asocio, dek kvin UK-oj, kvar fervojistaj kaj tri junularaj kongresoj internaciaj, naŭ festivaloj de E-teatro, kaj multaj aliaj aranĝoj lokaj kaj internaciaj. Ŝi prezidis Sofian E-Societon (1979-1981), la Virinan Komisionon de BEA (1975-1986), kaj membris en la Virina Komisiono de UEA (1978-1982). En 1986 aperis ŝia aŭtobiografio *Teatro sen lingva bariero*.



Zef Luigi MJEDA (1921), Albanio. Profesie instruisto, li laboris ankaŭ kiel ĉiĉerono, kio kontaktis lin en 1959 kun la vjetnama ambasadoro Nguyen Van Kinh. Tiu entuziasmigis lin pri E-o, al kio Mjeda poste plene dediĉis sin. Li multe korespondis, sed kiam tio iĝis malebla, li verkis, tradukis, kompilis vortarojn, kaj kaŝe instruis la lingvon. En 1967 li estis arestita sub absurdaj pretekstoj. Naŭ jarojn li punlaboris en tabakfabriko. Li restis fidela al E-o sub plej severa diktaturo, kiu persekutis e-istojn. Post la demokratiigo li grandskale aktivis, ĉefe en intelektulaj kaj religiaj medioj. En 1994 aperis liaj lernolibro kaj vortaro. Delegito de UEA, aktiva membro de Internacia Katolika Unuiĝo E-ista kaj Kristana E-ista Ligo Internacia.



Eva SEEMANNOVÁ (1920), Ĉeĥio. Profesia aktorino, kiu post kariero en migranta teatro kaj Pragaj teatroj fariĝis tutlande konata prezentanto de unuaktoraĵoj. Post esperantistiĝo en 1949, ŝi gvidis Cseh-kursojn en multaj lokoj kaj someraj E-kolegioj. En 1954 ŝi fondis, inspirite de Baghy, la trupon “Verda ĉaro de Julio Baghy”, kies plej granda sukceso estis *Pigmaliono* de G.B. Shaw, prezentita i.a. en la Varsovia UK (1959). Famaj plenumoj estis *Legendo pri amo* de Nazim Hikmet, kiu mem ĉeestis la premieron, *Patrino* de Čapek, *Nora* de Ibsen kaj *Maryša* de fratoj Mrštík. Ŝi mem tradukis dramojn por la trupo, kaj ĉefrolis en ĉiu el ili. Post ĝia disfalo ŝi revenis al unuaktoraĵoj, kiujn ŝi prezentas ĝis nun. En E-gazetoj aperis ŝiaj poemoj, el kiuj du troviĝas en *Esperanta antologio*.



Eli URBANOVÁ (1922), Ĉeĥio. Instruistino. Ek-lernis Esperanton en 1948, kaj en 1950 provis unue versi en la lingvo. Amikiĝo kun Julio Baghy en 1952 donis veran impulson al ŝia verkado. Dekfoje ŝi premiigis en diversaj literaturaj konkursoj. Ŝiaj poemoj aperis en Esperanto-gazetoj dise tra la mondo. Ŝi aktive partoprenis verkistajn societojn kaj membris en la juĝkomisiono de Belartaj Konkursoj. Ŝi aperigis entute kvin poemarojn: *Nur tri kolorojn* (1960), *El subaj fontoj* (1981), *Verso kaj larmo* (1986), *Vino, viroj kaj kanto* (1995) kaj *Peza vino* (1996). Ŝia literatura ĉefverko tamen estas *Hetaĵro dancas*, ampleksa aŭtobiografia romano (1995). Ŝi multe artikolis pri Esperanto en la ĉeĥa kaj gvidis diversajn kursojn. Ŝi estas membro de la Praga E-Klubo ekde 1949, honora membro de Ĉeĥa E-Asocio (1982) kaj membro de la Akademio de Esperanto (1986). ★

Internacia Kongresa Universitato

En Adelajdo havos lokon la 50-a sesio de IKU, kie rajtas prelegi universitataj profesoroj, lekciistoj, aŭ simile kvalifikitaj personoj. Ili estas invitatataj sendi siajn prelegproponojn al la sekretario de la IKU-komisiono, prof. d-ro Hans Michael Maitzen (Endemanngasse 6-18/1/24, AT-1230 Wien, Aŭstrio): maks. 200-vortan resumon de sia prelego, plus simillongajn biografion kaj bibliografion. La prelegoj prefere (ne devige) rilatu al la kongresa temo “Toleremo kaj justeco en multkultura mondo”. La elektitaj prelegantoj ricevos modestan honorarion, sed ne repagon de la vojaĝkostoj, kaj ili devos mem aliĝi al la kongreso. Aparte bonvenas kandidatoj junaj aŭ ankoraŭ ne prelegintaj en IKU. *Limdato por kandidatiĝo*: 15-a de januaro 1997.

Aldone al la tradiciaj IKU-prelegoj, Akademio Internacia de Sciencoj de San Marino kaj UEA okazigos specialajn universitatajn kursojn de AIS. Temas pri prelegoj, je populara nivelo, kiuj konsistigu seshoran koheran kurson pri temo pli vasta ol permesas la kutima IKU-kadro. Ankaŭ ĉi-tamajn proponojn sendu al la supra adreso.

Ne degeneras la librokulturo

La aranĝo "Libroj de la jaro" fariĝis tiom sukcesa en la lastaj UK-oj ke en Prago ĝi devis disdubi al du prezentoj: beletra kaj cetera.

Resumoj de enhavoj, legado de fragmentoj kaj eĉ anekdotoj eldonistaj intersekvis dense en la beletraĵoj 90 minutoj.

Ĉina E-Eldonejo alportis la unuan volumon de la grandioza ĉina romano *Ruĝdoma sonĝo*, kiu post la apero de la kompleto (atendata por 1997) estos la plej ampleksa beletra traduko iam ajn eldonita E-lingve.

Impeto (Moskvo) prezentis, voĉe de Andrzej Pettyn, fragmenton de la scienc-fikcia, soci-kritika romano *Ardes* de B. Tornado, amare amuzan.

La loka "skipo" Kava-Pech premierigis la mondkonatan dramon *Aŭdienco* de Václav Havel, *Sonĝo kaj aliaj rakontoj* de Franz Kafka (trad.

V. Lutermano), kaj dulingvan poemkajeron de Eli Urbanová, *Peza vino*.

Ankaŭ Fonto (Brazilo), kiu pasintjare atutis per la aŭtobiografia romano *Hetaĵro dancas* de la ĉeĥa poetino, publikigis poemojn ŝiajn (*Vino, viroj kaj kanto*). Alia ĉeĥaĵo el Brazilo estas bela dulingva reeldono de la satira poemo *La baptado de caro Vladimir* de Karel Havlíček Borovský, fama traduko de Tomáš Pumpr.

Sezonoj (Rusio) ne konsentas pri degenero de la librokulturo, almenaŭ en Esperantujo: la libroj kiujn ĝi prezentis en 1995, jam elĉerpigis. Same bona sorto certe trafos la novaĵojn *Princidino Mary* (Lermontov), *Kvarteto* (kvar poetoj originalaj), *La du turegoj*,

dua volumo de la Tolkien-a *La Mastro de l' Ringoj*, el kiu laŭtleĝis la tradukinto, William Auld, kaj *Naskiĝo de la rust-imuna ŝtalrato*, sciencfikcia romano de la mondkonata, esperantista Harry Harrison (kiu ĉeestis la UK-on). Ĉi tiu libro avangardas pro sia tradukmaniero: ĝin esperantigis pluro po en konstanta komputil-reta kunlaboro.

La revuo/eldonejo La KancerKliniko (Francio) lanĉis (en nia revuo jam pli frue) la bildrakonton *Aventuro de Momo* de fratoj Cavelan, tekston de Georgo Kamaĉo pri droga halucino, *La ĉapo de la sterko-vermo*, ambaŭ en revueca formato, kaj la poeziajn miniaturojn de Vimala Devi, *Pluralo*, en pli luksa vesto.

Edistudio (Italio) alvenis kun reeldono de *Ombro sur interna pejzaĝo*, furora romano de Spomenka Štimec, *Stokita vino*, rakontaro de Poul Thorsten, kaj la Kafka *La metamorfozo*, tradukita de Mauro Nervi. (En la menciita volumo de Kava-Pech eĉ la titolo de la sama verko malsamas — *La transformiĝo* —, kio promesas ĝuan komparon de la du interpretoj.)

Manuel de Seabra (Barcelono) prezentis mem sian famili-romanon *La armeoj de Paluzie*. Internacia E-Muzeo en Vieno, kiu daŭrigas la eldon-agadon de la formale ĉesanta Pro Esperanto, planas iom post iom publikigilian tutan verkaron.

Fine, Andrzej Pettyn anoncis beletraĵojn aperintajn kaj aperontajn sur sonkasedo, zorge de Pola Asocio de Nevidantoj (i.a. *La faraono* de Prus kaj *Quo vadis?* de Sienkiewicz).

En posta tago, prezentigis dudeko da libroj nebeletraĵoj. Por menciil nur la eldonejon kun la plej multaj novaĵoj, Kava-Pech montris plejparte ĉeĥalingvajn titolojn: tradukon de *La nova realismo* de Bruno Vogelmann, la furoran lernolibron *Esperanto en tri monatoj*, kaj la broŝurojn "Formulo de ekonomia sukceso" de Lee Chong-Yeong, "Kiel sukcesplene negoci kun japanoj" de Yosimi Umeda, kaj "Kion donis al mi la ĉeĥa literaturo" de KURISU Kei. Notindas manko en la prezento de striktasence fakaj libroj, ekz. pri teknikaj temoj. Estas domaĝe ankaŭ ke apenaŭ iu el la novaĵoj, ĉu literaturaj ĉu aliaj, estis jam havebla en la kongresa libroservo.

István Ertl

FURORAĴOJ DE LA KONGRESA LIBROSERVO

Titolo	Vendoj	Prezo (gld.)
1. Esperantem za tři měsíce (P. Chrdle, S. Chrdlová, E-kurso por ĉeĥlingvanoj)	*200	17,40
2. Baza ĉeĥa konversacio (S. Chrdlová, M. Malovec)	*100	3,00
3. La metamorfozo (Kafka, tr. M. Nervi)	81	24,00
4. Kubaj popolaj fabeloj (M. Bacev)	*80	4,50
5. Sonĝo kaj aliaj rakontoj (Kafka, tr. Lutermano)	*77	15,00
6. Muzik-pluvo (kompakta disko de Akordo)	73	30,00
7. Pasporta Servo	60	24,00
8. Aŭdienco (dramo de V. Havel)	*57	4,80
9. Vortaro Esperanta-ĉeĥa (K. Kraft, M. Malovec)	*57	26,40
10. Asteriks kaj la normanoj (bildstrio de Goscinny-Uderzo)	54	16,80
11. Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI (gvidilo)	50	4,80
12. Jadwiga kantas (kasedo de kanzonoj)	42	22,50
13. Gramatiko de la ĉeĥa lingvo (M. Malovec)	*41	3,30
14. Mazi en Gondolando: Aktiviga libro (B. Chmielewska)	41	28,20
15. Die gefährliche Sprache (U. Lins, <i>La danĝera lingvo</i>)	*35	42,00
16. Asteriks kaj Kleopatra (bildstrio de Goscinny-Uderzo)	33	16,80
17. Pri la bezono de lingvo internacia (raporto de I. Nitobe)	33	3,00
18. La nova testamento	30	7,80
19. La serĉado de la perfekta lingvo en la eŭropa kulturo (U. Eco)	30	36,00
20. Romeo, Julieta kaj la tenebro (J. Otčenášek)	*27	7,50

*venditaj rabate

Triumfoj italaj kaj svedaj

Se, inspirite de la samtempaj Olimpiaj Ludoj, ni farus laŭlandan poento-tabelon de Belartaj Konkursoj, ni konstatus pli-malpli egalan ĉampionecon de Italio kaj Svedio, pro kvin respektive kvar diplomoj.

La juĝantaro de Belartaj Konkursoj estas certe la sola UEA-komisiono kies membroj legas ĉiun ricevitan paperon, eĉ plurfoje — ĉercis Osmo Bulter, sekretario de la Konkursoj, enkonduke al la dumkongresa premi-disdono en la salono taŭge nomita Karolo Piĉ, kie ĉeestis centoj da interesatoj. Kelkaj anoj de la 20-persona juĝkomisiono cetere sidis surpodie kaj ricevis florbukedan dankon pro sia senlaca legado.

Post la fastaj jaroj 1994 kaj la fekunda 1995 (kia partoprenis 57 resp. 120 konkursoj), la rikolto en la nuna jaro montriĝis pli averaĝa — se konsideri ke ja kandidatiĝis ne malpli ol 109 verkoj, el kiuj 17 meritis premion aŭ honoran mencion, sed la unua premio



MAURO NERVI

En stacidomo

Ĉe la ŝtupar' hezitis via mano
adoleske senringa, tremlegere
kiel vibranta bildo sur ekrano;

mia dezir' tuj flirts efemere,
aliformiĝis al ridet' burleska
dum la memor' impetis malespere

sur min. Kaj via mano adoleska
hezita haltis, kvazaŭ por ĉantaĝo
al mi, anĝelo de real' groteska.

Sed ĉe la trajn' surondis la malsaĝo
nin ambaŭ, kaj per movo supreniglita
al mi, senmova en silentokaĝo,

leviĝis adoleska man' hezita.

restis ne aljuĝita en kvar branĉoj, kaj ankaŭ ne aperis premiinda Nova Talento. Grandparte la ĵurio rekompencis nomojn jam renkontitajn, kun la escepto de poeto Anatole Tarás Lubovich (Usono) kaj eseisto Olle Hällefors (Svedio).

Tri el la kvar svedaj premioj iris al la konata prozisto kaj tradukisto Sten Johansson (Svedio), kies originalaj verkoj kaj elsvedigoj ofte gastas en nia rubriko "Laste aperis". Dum la svedaj



Premiita en Belartaj Konkursoj, Nervi gajnis ankaŭ la plaĉon de la publiko, per sia furora Kafka-traduko.

gajnintoj fizike forestis, du el la kvin italaj premioj persone prezentis sian verkon: Aldo Fiorentin, kiu plane akompanis sin mem ĉe la kanto *Ho, mia land'*, kaj Cristina de' Giorgi, leganta sian emociple-nan novelon *La pluŝa kato* (legebla en *Kontakt*, 1996/4).

Patroj ludis rolon en ambaŭ kazoj: pro la komponaĵo de Aldo Fiorentin la teksto estis verkita de lia patro Fiorello, dum Cristina de' Giorgi per dediĉo dankis sian patron, laŭ kiu ŝi "ne sufiĉe agas por ke li fieru pri ŝi". (Por eviti miskomprenojn: Aldo de' Giorgi estas juĝanto en la branĉo *poezia* de la Konkursoj.) *En stacidomo* de Mauro Nervi (vd. maldekstre) estis laŭlegita de Wera Blanke. La publiko aprezis la poemon, kvankam ĝia "temo [estas] febla, ne tre klara, sed la formo perfekta", laŭ unu el la ĵurianoj.

En la branĉoj esea kaj kanta pli frue ekzistis nur po unu premio, nomitaj "Luigi Minnaja" kaj "Ahn Song-san". Ekde la pasinta jaro tamen eblas aljuĝi ankaŭ duan kaj trian premiojn, kiel en ĉiuj aliaj branĉoj. En 1996 tiu aranĝo fariĝis konstanta.

REZULTOJ DE BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA 1996

POEZIO: Unua premio: ne aljuĝita. Dua premio: Mauro Nervi (Italio) pro *En stacidomo*. Tria premio: Anatole Tarás Lubovich (Usono) pro *Veraj koloroj*. Honora mencio: Mauro Nervi pro *Don Juan Teno-rio*. Partoprenis 50 poemoj de 22 aŭtoroj el 16 landoj.

PROZO: Unua premio: ne aljuĝita. Dua premio: Sten Johansson (Svedio) pro *Bonan matenon!* Tria premio: Sten Johansson pro *Nokta halto* kaj Cristina de' Giorgi (Italio) pro *La pluŝa kato*. Partoprenis 26 verkoj de 18 aŭtoroj el 11 landoj.

TEATRAĴOJ: Unua premio: ne aljuĝita. Dua premio: Georges Lagrange (Francio) pro *La ruĝaj formikoj*. Tria premio: Sten Johansson (Svedio) pro *Nepo benita*. Partoprenis 11 teatraĵoj de 9 aŭtoroj el 6 landoj.

ESEO: Premio Luigi Minnaja: Olle Hällefors (Svedio) pro "... strebad' iel valoras eĉ en duongrad'". Dua premio: Gian Carlo Fighiera (Italio) pro *Purlingvismo kaj unulingvismo en Eŭropo tra la jarcentoj*. Tria premio: Oldřich Kníchal (Hungario) pro *La ĉeĥa literaturo en la spegulo de la Esperantaj tradukoj*. Partoprenis 8 eseoj de 7 aŭtoroj el 5 landoj.

KANTO: Premio Ahn Song-san: Tarcísio José de Lima (Brazilo) pro *Tiun ĉi*. Dua premio: Tarcísio José de Lima pro *Io lanta*. Tria premio: Fiorello Fiorentin kaj Aldo Fiorentin (Italio; teksto kaj muziko, resp.) pro *Ho, mia land'* kaj Mike Sadler (Hungario) pro *Hej! Hipopotamo*. Partoprenis 8 kantoj de 4 aŭtoroj aŭ duopoj aŭtoraj el 4 landoj.

INFANLIBRO DE LA JARO: *La infanoj en la arboj* de Gudrun Pausewang, tradukita de Nora Caragea, eldonita de Inter-Kulturo (Slovenio). Partoprenis 4 libroj de 4 eldonejoj el 4 landoj.

VIDBENDO: Unua kaj dua premioj: ne aljuĝitaj. Tria premio: Laŭzana Esperanto-Societo (Svislando) pro *La Verda-stelulo*. Partoprenis 2 filmoj el 2 landoj.

ie

Lingvo-instiga sperto por infanoj

Al la 18-a Renkontiĝo de E-istaj Familioj (REF, 27 jul. – 4 aŭg., Bratislavo, Slovakio) venis 26 familioj el 15 landoj – entute ĉ. 75 homoj, el kiuj 29 aĝis inter 2 monatoj kaj 17 jaroj.

Gui ripozan semajnon kun sia tuta familio en medio kie oni uzas Esperanton en natura kunteksto, helpe al la lingva evoluo de la infanoj – jen la agrablo kaj utilo de REF-oj, el kiuj la 18-a estis la unua por mia familio.

Neniu krom la esperantista REF-grupo loĝis en kvaretaĝa junulara hejmo, ĉirkaŭata de verdaj kampoj, proksima al arbaro kaj baseno. Tiu cirkonstanco sukcese kreis E-lingvan etoson.

escepte bone parolis Esperanton, sed iuj el la pli etaj ofte respondis nacilingve. Bona sperto por ili estis la nekomprene de la aliaj, kiu instigis ilin al provado de Esperanto.

Por plenkreskuloj estis diversaj diskutoj, kaj kvardek-kapa publiko aŭskultis la prelegojn de dutaga internacia seminario pri esperantistaj familioj ĉe Bratislava Internacia Centro por Familiaj Studoj, kunlaboranta kun Rondo Familia kaj UEA [vd. dec. '95, p. 208].

Foto: Jozef Reinart



La REF-anoj en la urbocentro de Bratislavo.

Dum la semajno multaj ege ĝuindaj aktivaj okupis la tutan familion: kantado ĉe tendarfajro, promeno tra parko, obstaklo-konkurso en la arbaro, sportaj ludoj, naĝado, ŝipekskurso sur Danubo, desegnado, pentrado, skulptado, ludado kun modlopasto, gluado de bildetoj, ĉirkaŭdesegnado de infanoj kuŝantaj sur papero ktp. Por la strukturitaj eroj de la programo la infanoj estis dividitaj en tri grupojn laŭ aĝo, por ke ili ĝuu kontakton kun samaĝuloj. Nia filino Aisling, aĝa tri jarojn kaj duonon, estis en sep-infana grupo (3-5 jaroj) de Ankica Tišljar (Kroatio), al kiu ni tre dankemas pro ŝia pacienca prizorgo. La pli grandaj infanoj sen-

Kadre de la projekto “Multkulturaj familioj de la nuntempa Eŭropo” estis pritraktitaj rezultoj de sociologia esploro, kiu i.a. montras ke plurnaciaj familioj kies lingvoj inkluzivas Esperanton, estas multrilate pli toleremaj ol familioj unulingvaj aŭ neesperantistaj. La seminario ricevis saluton, nome de Unesko, de Joseph Poth, specialisto pri la lingvaj programoj ĉe ties Eduka Sektoro.

Nia Aisling ege ĝuis la semajnon. Ni elkre dankas pro la longa laboro de la organizantoj, familio Reinart, kaj ni certe intencas partopreni en la venontjara REF, marborde de Kroatio, en la unua semajno de aŭgusto 1997.

Seán Ó Riain (Irlando/Pollando)

De post kolono

John kaj Helga Rapley ĉeestis, escepte de la lekcionoj de Ignat Bociort kaj Mauro Nervi, la prelegojn de la 49-a Internacia Kongreso Universitato en Prago.

La rektoro, prof. d-ro Vlastimil Novobilský, dum la tuta semajno impresis nin per sia kompetenta direktado de la serio da prelegoj. Li radiis mildan, sed profundan kleracon, simpatian humuron kaj absolutan harmonion kun la profesoroj kaj “studentoj”.

Ni sukcesis ĉeesti kelkajn el la lekcionoj. Tiun de prof. Reinhard Selten ni ne kompetentas prijuĝi pro ĝia alta nivelo (t.e. pro nia malalta nivelo).

La spritan (kiel ĉiam) prelegon de d-rino Marjorie Boulton pri sorĉistinoj kaj iliaj katoj oni ŝovis en tiel malgrandan salonon ke ni apenaŭ sukcesis propriĝi al ni dekonon de kvadratmetro da koridora spaco – kaj tio malantaŭ dika kolono, kiun mi ne sukcesis forbuldozi.

Prof. Josef Kavka prezentis atententenan kaj lerte ilustritan prelegon pri la subakva vulkanismo. Ĉe la fino li invitis vidi unikan ekspozicion de diversaj rokformiĝoj kaj donis individuajn atenton al la demandantoj.

S-ro Kep Enderby, la sola politikisto inter nia prelegistaro, prezentis simpatian bildon de la indiĝenaj aŭstralianoj, kiuj dum 50 000 jaroj vivis en relative trankvila harmonio kun la naturo kaj nur dum la lastaj 200 jaroj ekkonas la problemojn de la “civilizado” fare de la invadintaj eŭropanoj. Li invitis siajn aŭskultantojn al surlokaj konstatoj ĉe la venontjara UK en Adelajdo, kies LKK li prezidos.

“Supersignoj, trasignoj kaj subsignoj” de prof. John Wells ne ŝajnis al mi lia plej brila temo, eble ĉar ĝi kovris terenon jam tro bone konatan de la plej multaj E-parolantoj. Fakte, iuj studentoj emis mem krivoĉi siajn valorajn kontribuojn, kio videble ŝancelis la kutiman trankvilecon de la preleganto.

Vera Barandovská-Frank (“Jan Novák – reprezentanto de internacia novhumanisma kulturo”) impresis nin precipe per sia eksterordinara scio de la latina, kiun ŝi evidente regas almenaŭ tiel bone kiel Esperanton.

John Rapley (Britio)

VIZITU VIAN PROPAN DOMON ĈE NIEUWE BINNENWEG 176 EN ROTTERDAMO DUM

MALFERMA TAGO

sabaton la 9-an de novembro 1996 (10h00 - 17h00)

- ★ Senhalta prezentado de Esperanto-filmoj
- ★ Aĉetante en la libroservo, vi ricevos rabaton de 10% (kaj ŝparos la sendokoston)
- ★ Senpaga loterio
- ★ Ankaŭ surprizaj ofertoj
- ★ Kafo kaj teo senpage servataj

**Speciala gasto:
HUMPHREY TONKIN**

El niĝeria malliberejo al Prago

En la kongresa inaŭguro oni menciis ke samideano el Kamerunio estis retenita de fremdaj soldatoj sur sia vojo al la UK. Feliĉe, je la fino de la kongreso Victor Nto Nto povis jam mem rakonti kio okazis.

Kiom vi aĝas?

Mi estas ĉe la sojlo de la forfalo de mia 27-a jaro.

Ĉu vi studas, laboras?

En 1992 mi licenciĝis pri biologio en Douala, sed ekde tiam mi ne trovis laboron. Gejunuloj ĵus diplomitaj mal-facile dungigās en mia lando. Mi ŝatus labori en evoluinta mondparto. Mi aperigis anoncon pri tio en *Kontakto*.

Kiel vi renkontis Esperanton?

Iun tagon mi parolis en protest-kunveno de studentoj en Douala, pri la strategio kiun la studentoj devus adopti. Poste venis al mi gratuli iu s-ro Balaga, kiun post du tagoj mi hazarde denove renkontis. Tiam li, unu el la UEA-delegitoj en Douala, parolis al mi pri E-o. En oktobro 1993 mi eklernis la lingvon, tute memstare. Mi baldaŭ kontaktiĝis kun s-ro Hans Bakker, kaj mi ekkorespondis, eklegis. Tamen, mia sola surloka ligo al E-o restis s-ro Jean Balaga. Ĉi tiu estas la unua fojo ke mi efektive parolas E-on.

Kaj tre bone! Vi certe konatiĝis kun aliaj lingvoj pli frue.

La francan mi uzas ekde la elementa lernejo, la anglan ekde la universitato. En Kamerunio, kie 13 milionoj da homoj parolas 300 lokajn lingvojn, la franca estas uzata ĉefe oriente, kaj la angla okcidente. La plej granda loka lingvo estas la bamilekea, kaj mia hejmlingvo la jabsia. Nuntempe, pro emo vekita de E-o, mi studas la germanan.

Kiel ni aŭdis, via vojo al la UK estis tre — eĉ tro — aventuroplena.

Mi ĉiam revis partopreni en UK, ĉar mi multe volas spertiĝi pri nia lingvo.

Foto: Fabienne Berthlot



Victor Nto Nto

al Lagoso, kie estas la plej proksima ambasado de Ĉeĥio. Mi alvenis la 12-an, vendrede, por aŭdi ke nur merkrede oni donos vizojn. Mi klarigis la urĝecon al la pordisto, kiu konsilis atendi. Post du horoj la ambasadoro venis en la ĝardenon. Mi alparolis lin, montris miajn dokumentojn, kaj li afable donis vizon. En du tagoj mi reveturis ĝis Calabar, marborda urbo proksima al Kamerunio, kie mi enŝipiĝis kun 61

Dank' al Hans Bakker kaj Michela Lipari, mia vojaĝo fariĝis ebla ĉi-jare.

Por peti vizon, mi ekvojaĝis la 9-an de julio al la najbara Niĝerio, en Calabar, kie mi enŝipiĝis kun 61

pasaĝeroj niĝeriaj kaj du virinoj el Kamerunio. Sed la postan tagon, je la naŭa matene, aŭdiĝis pafbruoj. Patrolantaj niĝeriaj soldatoj sieĝis la ŝipon kaj devigis nin iri al ilia bazo en la urbo Bakasi, kun la preteksto ke sur la ŝipo estis trovitaj varoj aĉetitaj en Niĝerio. Ili metis nin en malliberejon kaj batis, laŭplaĉe traktis ĉiujn. Nur ĵaŭde ili malarestis min, preninte de mi ĉion. Mi komencis almozi, kaj kolektis la sumon de 150 nairoj por veturi al la konsulejo de Kamerunio en Calabar. Sed la konsulo ne volis min helpi, eĉ ne permesis al mi tranokti en la korto. Du tagojn mi pasigis antaŭ la konsulejo, kaj en la tria tago mi petis helpon de preterpasantino. Tiu ekkompatis min, permesis al mi baniĝi kaj manĝi ĉe ŝi. Ŝi posedis juvel-vendejon. Ĉar ŝia edzo forestis, ŝi ne povis tranoktigi min, sed ŝi petis amikan paron pri tio. Ĉi tiu afabla paro havis faksilon kaj helpis min kontakti la Centran Oficejon. Ili eĉ donis al mi monon por reveturi al Kamerunio, de kie mi jam povis senprobleme ekvojaĝi al la kongreso. ★

KOREKTOJ AL LA JARLIBRO 1996

Bv. korekti jenajn erarojn:

Korea E-Asocio (p. 41 kaj 223): la ero 50-9 en la adreso estu 58-9; Akademio de Esperanto (p. 73): la ero 19 en la adreso de Jorge Camacho estu 18;

Telefonado (p. 92): vokante al Rumanio ellasu la komencan 0 (ne 9); Aŭstralio: aldonu komencan 8 ĉe ☎ kaj ☎ de ambaŭ delegitoj en Adelaide; Belgio: reklamo de Kariljono (p. 107): ☐ estu <esperanto_kariljono@msn.com>;

Britio: VD kaj FD en Huddersfield: ☎ estu (01484) 307736, ☎ estu (01484) 307762;

Nederlando: D kaj FD en Wylre: ☎ estu (043) 4501248; D kaj FD en Zuidwolde: ☎+☎ estu (0528) 372704;

Rumanio: București: la telefona prefikso por ĉiu delegito estu (01);

Rusio: ĈD kaj FD (varmenergio) en Moskva: ☎ estu (095) 2437456, ☐ estu <era@glas.apc.org>;

Svislando: D en Luzern: ☎ estu (041) 210 25 88.

Reagoj



Sen konsidero pri raso

Eĉ en la esperantista medio povas esti rasistoj, sed oni ne troigu. [Vd. “Ĉu rizesperantistoj?”, apr., p. 65.] La problemo estas alia. En mia lando oni ofte ne konscias kiom altegaj estas la salajroj kompare al la plej multaj landoj de la mondo — sed reciproke alilandanoj ofte forgesas ke ni havas milionojn da senlaboruoj kaj mizeruloj, kaj iuj skribas al esperantistoj en riĉaj landoj kun espero ricevi “helpon”. Nur dufoje mi ricevis tian leteron el Afriko, sed kiam fripono aperigis mian adreson sen mia konsento en *Amikaj adresoj*, venis proks. 20 petoj pri “helpo”, precipe el Rusio sed ankaŭ el Ĉinio — ofte ne en Esperanto. Ricevi tiajn leterojn agacas, sen konsidero pri la raso aŭ nacieco de la sendinto. Feliĉe, UEA povas enketi pri la veraj esperantistoj en vere granda bezono kaj helpi pere de Konto Espero.

Jean-Pierre Boulet (Francio)

Rizesperantistoj: ne nur en Afriko

El la tri afrikaj plum-geamikoj kiujn mi ĝis nun havis, du jam en la dua letero petis monon por al-kongresa vojaĝo, dum la tria nenion petis sed eĉ sendis donaceton. Helpon pri laboro en Nederlando petis du senlaboraj poloj kun kiuj mi jam kelkajn jarojn korespondis, sufiĉe multekostajn librojn petis bulgario kiun mi nur unu fojon renkontis, monhelpon petis nekonatoj el Ĉinio kaj Srilanko, kiuj trovis mian adreson en la Jarlibro, same kiel petanto pri libroj por E-kurso en Kubo.

Anneke Schouten-Buys (Nederlando)

Interna ideo ≠ sektismo

Al kelkaj el la demandoj de s-ano Ziko M. Sikosek, faritaj en la fino de lia artikolo “For la Esperantan sektismon!” (jul.-aŭg., p. 136), mi, dumviva “TEI-ano”, respondas per alia demando: se mi ne kredas pri fina venko de Esperanto; se mi ne rigardas tiun venkon kiel eblan kaj nepre bonvenan eventon; se por mi

ne ekzistas streĉa monda lingvo-problemo; se Esperanton mi ne rigardas kiel la plej altan esprimon de historie konstatebla lingva evoluo, kvankam memkompreneble ne perfektan; se mi, fine, ne rigardas Esperanton kiel la solvon racian kaj justan por la interkomunikaj rilatoj sur la kampo de la internacia vivo — kio do povas motivi mian aniĝon (jam antaŭ 30 jaroj) al tiu afero?

Kio kondamninda kaj malutila al Esperanto troviĝas en la tiel ofte ridindigata “interna ideo”? Esperantistoj ja konsistigas “popolon” havantan proprajn aspirojn, konkretajn idealojn. Tiu popolo rilatas al sia “interna ideo” tute same kiel nacioj rilatas al la aspiroj kaj idealoj de siaj respektivaj nacioj.

Estiel TEI-ano mi revas pri la iom-post-ioma disvastigo de tiu vasta sento pri aparteno al la Homaro super ĉiuj limoj, materialaj kaj spiritalaj, kio tute ne implicas malamon al naciaj lingvoj nek al io ajn nacikarakterata. Kaj tio nepre ne estas “naiva konkeremo”, sed ja simpla afero de konsekvenco.

Dum tridek jaroj da aktiva por-esperanta laborado oni min neniam rigardis sektano pro mia esperantisteco. Ĝuste, la ĝenerala sinteno estis ĉiam simpatia, favora, instiga. Eĉ rimarkindas ke la interna ideo, anstataŭ malsatindigi la lingvon antaŭ la ekstermovada juĝo, kontraŭe altigas ĝian prestiĝon — eble tial ĉar la ligiteco inter la lingvo kaj la idealo montras ke Esperanto ja estas vivanta estaĵo kun korpo kaj animo.

Iam Zamenhof rekomendis ke sur la Esperanta standardo oni skribu la vorton “konkordo”, aldone al la jam skribitaj “espero, obstino kaj pacienco”. Ŝajnas al mi ke nuntempe nova vorto skribendas: FIDO.

Affonso Borges Gallego Soares (Brazilo)

Mi estas fervora TEI-ano

La Esperanto-movado ja estas “kvazaŭ-religia” afero, ĉar, pere de komuna helplingvo neŭtrala, ĝi fun-

damente celas amon, pacon, justecon, klerigadon kaj interfratiĝon de homoj, same kiel ĉiuj veraj religioj. Tial ĝi postvivis ĉiujn sortobatojn.

Homo povas certigi pri io per kvar ebloj, malperfektaj unuope sed arope valoraj: percepto, dedukto, tradicio kaj intuicio. Mi mem fakte konstatis dum la 81-a UK ke Esperanto vere funkcias. Racio konvinkis min ke Esperanto ne estas perfekta lingvo, sed ĝi multe superas aliajn pro siaj ecoj. Mia religia tradicio, bahaismo, asertas ke nepras internacia elekto pri unu komuna helplingvo, eble Esperanto sed ne certe. Fine, la voĉo de mia koro konfirmas la disvastigendon de tiu mirinda koncepto. Tial mi estas fervora TEI-ano.

Sed ne gravas kiel ajn oni nomas min, nur gravas servi la homaron saĝe kaj diligente.

Eric Coffinet (Francio)

Ni ne havu kompleksojn

Kion faris la franca registaro ĉe Ligo de Nacioj en 1921-23, tion certe farus la nuna ĉe UN kaj ties institucioj. Ni ne havu kompleksojn pri tio kion Sikosek nomas “TEI”. Nia ideologio estas milda kompare kun tiu de la franca registaro; la nia estas malpli sektema kaj freneza.

Henri Masson (Francio)

Pli efike informadu pri eŭropaj problemoj!

Aŭskultante en Prago la parolantojn de la 19-a Esperantologia Konferenco, provantajn karakterizi la “Esperantan lingvo-komunumon”, mi tuj memoris pri trafa ekzemplo de “unueco en diverseco” en Esperantio. Temas pri la Dua Esperanta Eŭrop-Unia Kongreso (2-6 jun. 1995, Parizo), pri kiu *Esperanto* raportis redukte, maltrafante la esencon (jul.-aŭg. ’95, p. 126; poste en la Estrara Raporto: jun. ’96, p. 111).

Apud la oficiala deklaro de la kongreso, la kelklinia raporto en jul.-aŭg. ’95 listigas nur program-punktojn, sen paroli pri ilia enhavo. Tamen, la du tre riĉaj prelegoj de C. Piron kaj G.C. Fighiera meritis publikigon, analizon kaj diskonigon. Kaj kial nenio pli pri la dua sesio ol ke ĝi “estis publika forumo”? Tie Hans Erasmus klarigis la laborplanon de Laborgrupo pri la Lingva Problemo en EU, singarde starigitan, por alprenigi la lingvon internacian,

sen veki alergion kontraŭ E-o ĉe la eŭropaj instancoj. En la sekva debato prof. Núñez proponis pli vastan strateĝon, apogita de prof. Broccatelli, ambaŭ pretaj organizi tiucele some-rajn universitatajn kursojn. Intervenis multaj aliaj: d-ro Greatrex, d-ro De Smet, M. Cwik ktp.

Dum la lasta kunveno estis malfrue prezentita rezoluci-propono pene ellaborita. Ĝin oni akceptis, laŭ la revuo, “post iomega konfuzo kaj fuŝa disputado”. Nenion similan mi observis, sed, male, vivan, lojalan, kuraĝigan, kvankam tro rapidan debaton. La ĉeestantaro ekvigligis. Elstaraj kongresanoj, spontane kaj sen ia perturbo, sin esprimis laŭorde. Prof. Bormann diris “ne” al la propono, ĉar en ĝi mankis la nomo “Esperanto”. Prof-oj Núñez kaj Fighiera vigle aprobis. La kongresanoj vibris pro emocio, ĝis prezidanto Greatrex sukcesis aŭdigi sian voĉon. Dume eminentuloj serĉis kompromison, kiun trovis d-ro Blanke, parolante pri “sistemo konsideranta la sperton akiritan de E-o”. La rezolucio estis ĝustatempe amendita. Konklude, bone funkciis la Esperanta demokratio.

Nia revuo pli efike informadu sian legantaron pri Eŭropa E-Unio kaj pri eŭropaj problemoj, por pli bone prepari la 3-an Eŭrop-Unian E-Kongreson en majo 1997 en Stutgarto!

Maurice Issert (Francio)

EU-deputitoj ne estas lingvistoj

Laŭ J. Lindstedt (jul.-aŭg., p. 123), se Eŭropa Unio enkondukus Esperanton, ties “formo kaj evoluo” estus en la manoj de “la potenca Unia administracio”. Tio ŝajnas al mi iom senbaza aserto. Trarigardante liston de la kandidatoj + anstataŭantoj de partio kiu rikoltis 30% de la voĉoj en Valonio, mi konstatas ke laŭ sia diplomo neniu el ili estas lingvisto. Mi supozas ke en aliaj landoj la situacio similas. Ĉu s-ro Lindstedt pensas ke eŭropa deputito iĝos lingvisto nur pro sia elekto kiel parlamentano?

Maurice Wouters (Belgio)

Fama, sed pro kio?

En “Laste aperis” (apr., p. 75) oni citas *La preĝado* de Alexis Carrel, tradukitan de d-ro Albault. Ĉu tiu Nobel-ulo ne famiĝis ankaŭ pro siaj naziaj simpatio kaj antisemitismo?

D-ro Blaise Berthomieu (Francio)

Nepublikigita, sed oficiala

Tuj post la apero de nia artikolo “Zamenhof kaj la Honora Legio” (jun., p. 101), ni ricevis interesan kaj tre klerigan leteron de la konata movad-historiisto Jean Amoureux el Francio, kiun ni parte citas:

Oficialaj dokumentoj [...] sendiskute pruvas ke Zamenhof estis kavaliro de la franca Honora Legio. Dank’ al *Esperanto* la sopirata pruvo estas vaste diskonigata, kaj tio estas tre bona.

Ĉagrenas min nur la fakto ke la du akompanaj fotoj en la junia *Esperanto*, interalie kovrilpaĝe, bedaŭrinde ne montras Zamenhof-on kun pendanta honorlegia dekoracio!

antoj — kiu montras Zamenhof-on kun la honorlegia ordeno.

Mi povas krome aldoni ke la demandsignon en via traduko de “Dokumenteto 2” vi povas forigi: *m.j.* signifas “même jour”, ja “samtage”.

Jean Amoureux (Francio)

En sia artikolo “Zamenhof kaj la Honora Legio en la diplomataj kulisoj” (*Franca Esperantisto*, jan. 1995),

Amoureux cetere donas klarigon pri la malkutima manko de publikigo, en *Journal Officiel de la République Française* (“Oficiala Gazeto de la Franca Respubliko”), de la dekreto pri la ordeno de Zamenhof.

La franca registaro ne povis ordeni aliregnanon ne petinte konsenton de ties registaro. Amoureux supozas ke en la jaro 1905, kiam la poloj ribelis kontraŭ la cara reĝimo, la rusa burokrataro ne donis tian konsenton. Tio tamen ne signifas ke la ordeno iel malvalidis. Ekzistas letero de Zamenhof (24 septembro 1905) al Émile Javal, en kiu li kvitancis la ricevon de la ordeno kaj de la rajtigaj dokumentoj. Es-

tas signife ke Zamenhof notis en la margeno: “Mi petas Vin, volu kon-
servi tiun ĉi mian leteron, ĉar povas esti, ke ĝi estos iam utila por la esperantistoj.” Laŭ la artikolo de Amoureux, tio ŝajnas atesti timon de Zamenhof ke oni povus iam dubi pri lia efektiva ricevo de la honorlegia ordeno, “rifuzita al li de la rusa registaro sed grandanime donita al li de la franca registaro.” ★


Zamenhof kun la honorlegia rubandeto ĉe la butontruo



Same kiel multaj kongresanoj en Kembrigo (1907) li surportas kvin-pintan stelon (probable verdan) fine de longa hela rubando, dum la honorlegia dekoracio estas tute aliaspekta kaj la rubando estas ruĝa. [...]

Mi aldonas foton de Zamenhof en Dresdeno (1908) ne kun pendanta honorlegia kruco, sed kun ties rubandeto ĉe la butontruo. Miascie ĝi estas la sola foto — tamen kun vari-

Recenzoj




Inter hom-vrakoj kaj teroristoj

Apenaŭ papilioj en Bergen-Belsen. Trevor Steele. Vieno: Pro Esperanto, 1994. 148 p. 23 cm. 30 gld. **La floroj de l' krepusko.** Serĝo Elgo. Prilly: LF-Koop, 1995. 168 p. 21 cm. 29,10 gld.

Juna anglo, instruisto de la germana lingvo, iras al Germanio por deĵori kiel sociala helpisto: jen Mark Bryant, protagonisto de *Apenaŭ papilioj*... Li ne nur eniras novan fakon, sed samtempe ekiras la vojon de esploro de si

logojn. Li kaptas kaj tenas lingvo-lerte la atenton ĝis la fino. Unue mi emis pensi ke la aŭtoro iom malkredinde pentras teroristojn kun miksitaj infaneco kaj sang-avido. Tamen, mi timas ke li eble pravas.



Steele (maldekstre) kaj "Elgo": atentokaptaj kaj -tenaj romanistoj

mem, de siaj kunhomoj, kaj de la ebla ĥimero — la senco de la vivo. Pro plej miksitaj motivoj, li akceptas postenon de provizora estro de socialhelpa hejmo, kie loĝas viroj, plejparte slavo, kiuj pro la vivo-sorto kaj koncentreaj hororoj fariĝis hom-vrakoj. Dum la hejmestro provas helpi la virojn kaj dum ili mem provas elturniĝi, oni kredas senti la homecon de la hejmanoj kaj la homan kreskon de la estro. Jen fascina kaj pensiga verko, kadrita de eventoj kaj cirkonstancoj nekutimaj, tamen kredeblaj.

En *La floroj de l' krepusko*, post la murdo de vicministro pri armeo diversaj policaj taĉmentoj klopodas malkovri la farintojn, membrojn de terorista grupo. Inspektoro Kramer turnas sin por helpo al prof. Pruvost, specialisto pri la historio de terorismo en la 19-a jarcento, sed ankaŭ suspektato. La aŭtoro lerte plektas manplenen da personoj en la intrigon, enmiksante ideologiajn diskutojn kaj vivecajn dia-

Apenaŭ papilioj... estas mozaiko el epizodaj fragmentoj iom-post-iome kunigantaj, en stilo flua kaj elvoka. Dum la romano de Steele temas esence pri persona evoluo, Elgo donas ĉefe politikan-ideologian framon en kiu la roluloj reliefigas la kontrastajn ideojn de memsufiĉa burĝeco kaj fuŝforma revolucio. *La floroj*... same en tre glata stilo, estas malpli kohera, pro manko de centra rolulo kaj pro pli supra pentrado de personoj — sed la aŭtoro ŝajne intence rakontas tiel pri malkoheruloj. En ambaŭ verkoj estas kelkaj neologismoj, sed ĝenerale ne tro ĝenaj, krom *hodiaj* kaj *morgaj* anstataŭ *hodiaŭaj* kaj *morgaŭaj* ĉe Elgo. Mi dubas pri la neceso de la Elgo-aj *hato* (malamo), *mediatoj* (amaskomunikiloj) kaj *vesperejo* (vespera festo).

Ambaŭ verkoj estas legindaj. Tamen, en mia memoro aparte longe restos *Apenaŭ papilioj*... kun Mark Bryant kaj la "hantata" Jakub Matejko.

Bruce Crisp (Kanado)

Valora proksimeco

Tena. Hejmo en Mezeŭropo. Spomenka Ŝtimec. Vieno: Pro Esperanto, 1996. 104p. 23cm. 22,50 gld.


Kiam en Zagrebo mortis Tena, la avino, oni devis informi la parencojn en Beogrado helpe de amiko en Slovenio, ĉar rekta telefonado inter Kroatio kaj Serbio ne eblis. Kiam la onklino vojaĝis de Serbio al Kroatio por tie partopreni la entombigan ceremonion, ŝi iris tra Hungario, kaj sukcesis eniri Kroation nur ĉar ŝi retrovintis sian baptodokumenton el la jaro 1929, pruvantan ŝian apartenon al la katolika eklezio. Jen kio okazis — kaj okazadas — en la hodiaŭa Eŭropo, en la naŭdekaj jaroj, en regiono kiun la aŭtorino kun obstino nomas "mia parto de Mez-Eŭropo", en regiono kiu ankoraŭ suferas pro milito kaj ĝiaj kruelaj sekvoj.

La nova teksto de Ŝtimec staras en unu vico kun ŝiaj aliaj prozaĵoj, samrange en sia fascina simpleco, bela kaj tamen trista. Ĝi enhavas personajn memorojn spicitajn per komentoj pri familiaj kaj regionaj kutimoj, tipaj situacioj, ŝatataj ĉiutagaĵoj. Ŝi pentras la longan vivon de Tena — plenkreskinta en la jaro de la formiĝo de Jugoslavio, mortanta dum ĝia senpaca disfalo —, virino bonkora, lerta en pluraj sencoj, vivama. La libro estas skribita kun iu timo, nome ke kun la morto de Tena kaj kun la plu kreskanta malamo kaj la milito, povus perdiĝi la memoroj, la tradicioj, la vivovaloroj. La teksteroj kiujn ŝi prezentas estas "rompaĵoj nur, sed persone gravaj", Ŝtimec konfesas librofine, kaj la legantoj konservu ilin, dume. Ĉar dume ŝi ankoraŭ ne scias "de kiu flanko venos la trafa, kiu detruos".

Ni, en niaj aliaj partoj de Mez-Eŭropo, kaj ĉie ajn kie homoj sen granda financa malfacilaĵo povas aĉeti (kaj nepre aĉetu!) ĉi tiun ankaŭ ekstere belan libron, la 16-an en la Serio Originala Literaturo de Pro Esperanto, ni urĝe bezonas tiajn personajn tekstojn, por kompreni tra la hastaj televidaj bildoj el la tro multaj, tro foraj lokoj kie oni batalas, ke homoj ĉie ajn amas kaj naskas, kun homaj sopiroj kaj individue, eĉ inter la malamo kaj la morto kolektivaj. Tiu proksimeco kiun la libro kreas, estas ĝia plej alta valoro.

Ulrich Becker (Germanio)

Laste aperis



Aŭdienco. Unuaktaĵo (1975). Václav Havel (1936). El la ĉeĥa trad. Josef Vondroušek. Dobřichovice: Kava-Pech, 1996. 39p. ISBN 80-85853-26-4. 19cm. Unu el la plej famaj dramoj de la ĉeĥa verkisto-prezidento, amara komedio el la obtuz-etosa komunisma epoko. 4,80 gld.

Benzin-stacio kiel tabernaklo, La (1996). Bastiaan Bommeljé. El la nederlanda trad. Oene Hoekstra. Schoorl, 1996. 7p. 21cm. Eseeto pri "la tabernaklo de nia hodiaŭa civilizacio". 2,70 gld.

Ĥo de niaj krioj / Ozveny po výkriku. 7 slovakaj poetoj el Rumanio. Komp. kaj trad. el la slovakaj Anna Lehotská. Nadlak: Kultura kaj scienca societo Ivan Krasko, 1996. 148p. ISBN 973-97400-7-3. 16x17cm. Lingve kunlaboris Oldřich Kníchal. Ilustris Mária Štefanková. Impona vivsigno de 20-mil-membra komunumo. 4,80 gld.

En unu koro. W jednym sercu. Teresa Wrodycka. El la pola trad. la aŭtoro kaj Czesław Żadziłko. Warszawa: Integracje, 1996. 117p. ISBN 83-86764-06-5. 17cm. Dulingva. Pentraĵoj de Jadwiga Szmidt. Sesdekda mallongaj poemoj kiuj konfrontas, ofte ironie, revon kun la realo. 7,50 gld.

Esperanto laŭ amuz-metodo. Legolibro kun paroligaj ekzercoj. Andrzej Pettyn (1938). Varsovio: Peano, 1996. 38p. 21cm. Ringe bind. libro + 60-min. kasedo (legas la aŭtoro). Amuzaj tekstoj pri la vivo en Bervalio. 24,00 gld.

Esperanto, lingua, letteratura, movimento. Pierre Janton (1933). El Esperanto kaj la angla trad. Marilde Chiericati-Salvioni, Umberto Stoppoloni, Giovanni Dolfi. Milano: CO ED ES, 1996. 191 (nenumeraĵoj!) p. ISBN 88-85872-07-7. 21cm. Itallingva. Ĝisdatigita traduko de *Esperanto: lingvo, literaturo, movado*. 19,80 gld.

Eŭropa kalendaro. Fasti Europenses 1997-1998. Red. Vera Barandovská-Frank. Paderborn: Eŭropa Klubo, 1996. 106p. ISBN 3-929853-05-1. 30cm. Ilustraĵoj de Anna Formaggio. Unu nova vorto ĉiutage en 15 lingvoj. Informoj pri Eŭropa Unio kaj pri ĝiaj membrolandoj Esperante, latine kaj en la koncerna nacia lingvo. 13,50 gld.


Fervoja terminaro / Lessico ferroviario. Esperanto-itala; Italiano-Esperanto. Budapest: Magyar Államvasutak Rt., 1995. 354p. ISBN 2-9011585-05-1. 20cm. UIC Railway Dictionary. La pli ol 8000 terminoj de la ĝenerala terminaro de Internacia Fervoja Unio, en ambaŭ direktoj. 39,90 gld.

For de mia hejmo. Hilja Sarapuu (1921). Högsby: Ulekso, 1995. 20p. 21cm. Kiel estonino pasigis naŭ jarojn en sovetia koncentrejo. 11,70 gld.

Historio de la ciferoj. André Cherpillod (1930). Courgenard: la aŭtoro, 1996. 26p. ISBN 2-906134-32-5. 21cm. Pri la diversaj cifersistemoj, ekde la egiptoj ĝis hodiaŭ. 9,90 gld.

Humuro laŭ la skota maniero. Andrzej kaj Remigiusz Pettyn. Antverpeno: Flandra E-Ligo, 1996. 84p. ISBN 90-71205-60-6. 21cm. Ilus. Kun 3 kasedoj (legas Andrzej Pettyn). 256 ŝercoj pri la onidire avaraj skotoj. 39,00 gld.

Invito al japana ŝako. Ueda Tomohiko (1936). Tokio: E-ista Klubo de Japana Ŝako, 1996. 70p. ISBN 4-9900498-0-2. 21cm. Enkonduko al fora kuzo de la internacia ŝako, nomata ankaŭ "ŝogio". 12,90 gld.



La fekunda André Cherpillod larĝanime verŝas el sia klero-botelo.

Magiaj bloketoj por luda, libera, interesa konversacio. Oene Hoekstra. (1923). 1996. 8p. 21cm. Konsiloj por efika uzo de konversaciiga instruilo. 2,70 gld.

Mazi en Gondolando: Aktiviga libro. Barbara Chmielewska. Kunlaboris Roman Dobrzyński, Stefan MacGill. Ilustraĵoj de Ewa Michen-Ulicka. Warszawa / Den Haag: Tommy / Internacia E-Instituto, 1996. 94+5p. ISBN 83-85677-60-7. 24cm. Kolorpresita. Ringe bindita. Ludiga ekzercaro, plej utila kiel akompanaĵo al la populara vidbenda kurso *Mazi*. 28,20 gld.

Mortotuko de Torino, la neebila objekto, La. André Cherpillod (1930). Courgenard: la aŭtoro, 1996. 145p. ISBN 2-906134-33-3. 21cm. Ĉu, spite la faman datadon per karbono 14, la mortotuko de Jesuo estas tamen aŭtenta? 30,00 gld.

Nia Ameriko (1891). José Martí (1853-95). El la hispana trad. Orlando E. Raola. Berkeley: Pensama, 1996. 35p. ISBN 1-882251-18-1. 21cm. Daŭre pensiga eseo de la kuba nacia heroo pri la rilatoj inter Usono kaj la latin-amerikaj popoloj. 7,50 gld.

Ni ludas por lerni. Laŭ la [h]olistika metodo. Alessandra di Donato. Ilustraĵoj de Simona Patrjarka. Roma: 1995. 102+104p.

17x25cm. Aparte dika papero. Ringe bind. Porinfana kurso adaptita al "la naturaj inklinoj de ĉiuj lernantoj". 27,00 gld.

Pri la bezono de lingvo internacia. On the Need for an International Language / Sur la nécessité d'une langue internationale (1921). NITOBÉ Inazô (1862-1933). El la angla trad. Edmund Grimley Evans. Rotterdam: UEA, 1996. 20p. 21cm. Trilingva: angla, franca, Esperanta. Eltirajo el la raporto kiun la aŭtoro, tiam vicsekretario de la Ligo de Nacioj, prezentis al la Ligo post sia vizito al la 13-a UK en Prago. 3,00 gld.

Romantikulo en la XX-a jarcento, La. Arnau Torras Tutusaŭs (1966). Zagreb: Studenta E-Klubo, 1996. 48p. ISBN 953-96912-1-4. 30cm. Dua volumo da malprudegaj bildrakontoj, kun amoro, vojaĝoj kaj Esperanto kiel ĉeftemoj. 12,00 gld.

Se mi estus birdeto. Se eu fosse um passarinho. Doroti Guirio Marino (1952). Ilustraĵoj de A. M. Iaia Vespa. São Paulo: União Fraternal, 1996. 105p. 21cm. Dulingva: portugala-Esperanta. Kvindekda poemoj inspiritaj de amo al la naturo kaj al la homoj. 12,90 gld.

Vizito en la fora Oriento. Kerstin Rohdin (1937). Högsby: la aŭtoro, 1994. 34p. 30cm. Vojaĝspertoj en Koreio kaj Japanio. 15,30 gld.

Vojaĝo laŭ la Balta maro. Kerstin Rohdin. Högsby: la aŭtoro, 1994. 15p. 30cm. Tra- vivaĵoj en Estonio kaj aliaj landoj. 7,80 gld.

DIVERSAĴOJ

Kasedo: Enkonduko en la instruon de Bruno Gröning. 1996. Skriboj kaj sentencoj de Gröning. Sukcesraportoj de saniĝintoj. 9,60 gld.

Vidbendo: Zamenhof en Zagornik. Raporto pri la nomiga ceremonio de Zamenhof-lernejo en Pollando. R. Dobrzyński. La aŭtoro, 1996. VHS/PAL. 20 min. 30,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA,

Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!



Ni ne klopodu vendi ne finbakitan aferon



En Ziko M. Sikosek ("For la Esperantan sek-tismon!", jul.-aŭg., p. 136) mi trovis paren-can animon. Ankaŭ mi vidas en la *finvenkismo* la

plej grandan obstaklon al la dis-volviĝo de niaj lingvo kaj ideo. La strebado trudi Esperanton al ĉiuj po-poloj pere de internaciaj kaj naciaj instancoj (UN, Eŭropa Parlamento, registaroj) kaj per ties leĝoj kaj dekretoj vekas en la subkonscio de centmilioj da homoj sentojn kon-traŭ E-o. Kvankam uzado de E-o estus per si mem demokratia, klopodo trudi ĝin estas esence maldemokratia.

Dum la kongresfina sabato (27-a de julio) aperis en la ĉeflingva junulara ĵurnalo *Mladá fronta dnes* artikolo pri la UK, titolita "La Esperanto-klubon en la urbo konsistigas plejparte pensiuloj". La junaj redaktoroj ape-naŭ povus esprimi pli klare sian ĝojon ke E-o esperige agonias. Ili certe ne uzus tian titolon se ili dezirus al E-o prosperon. Sed ili timas ĝin, ĉar neniu konsentas ke iu ajn lingvo estu al li trudata kontraŭ lia volo. Ankaŭ ni esperantistoj indigniĝus kaj ribelus se la Eŭropa Parlamento elektus por trudado alian lingvon ol E-on. Due, kiu jam kun granda peno ellernis iun lingvon, tiu ne deziras venkon de E-o, ĉar lia ĝisnuna lingvoscio per tio per-dus iom de sia valoro. Trie, la homoj ofte elektas lingvon laŭ tio ĉu ĝi al ili plaĉas; al multaj homoj nia lingvo simple ne plaĉas.

La *finvenkismo* forlogas niajn sam-ideanojn de la uzado de Esperanto al ĝia nura propagando. En Esperantio svarmas eternaj komencantoj kiuj persvadas aliajn lerni Esperanton, sed ili mem tion ne faras. Ili asertas ke

Esperanton kapablas ellerni ĉiu ajn homa estaĵo, kvankam ili mem estas pruvo ke la aserto mensogas.

Por la komunika tasko necesas Es-peranton prepari, sed ankaŭ de tiu laboro forlogas nin la miraĝo de la *fin venko*. Finvenkistoj opinias ke sufiĉas konvinki registarojn ke ili per speciala leĝo enkonduku Esperanton en lernejojn, kaj finite. Sed la tubero en la afero estas ke la registaroj ne scias Esperanton, sekve la tuta ŝarĝo de instruado kaj tradukado falegus sur la ŝultroj de UEA, do de ni ĉiuj. Ne sufiĉas nur instrui, sed necesus ĉiutage esperantigi montojn da diversaj tekstoj kiujn oni nun eldonas en la mond-lingvoj; se ĵurnalistoj, politikistoj, eko-nomiistoj, inĝenieroj, sciencistoj, kura-cistoj ktp ne trovas ĉiutage la plej aktualajn novaĵojn de sia fako en Esperanto, ili devus reveni al la kla-sikaj malnovaj mondlingvoj. Espe-ranto fariĝus nur honora prezidanto de la internacia komunikado, sed en la praktika vivo plu regus la angla, germana, franca k.a. Esperanto havas kompare kun tiuj lingvoj grandan handikapon: ilin parolas centmilioj da denaskuloj kiuj prizorgas la tutan literaturon, sekve al fremduloj sufiĉas pasiva scio, dum Esperanton la frem-duloj devas lerni aktive, alie ekzistus neniu kiu povus en ĝi verki.

Ni preparu nin por la reto

Por regi Esperanton sufiĉas scii ĝiajn gramatikajn principojn, ne la tutan vortostokon — sed tiom pli necesas grandaj vortaroj, en kiuj ĉiu trovos la terminojn kiujn li ne portas en la kapo. Ĝis nun ni povis elturniĝi per tio ke mankas mono por tiaj vortaroj. Sed nun per komputilo oni povas krei grandajn vortarojn, senĉese kompleti-gadi kaj facile kopii ilin. Relative baldaŭ ĉiuj entreprenoj, oficejoj kaj ankaŭ hejmoj estos reciproke konektitaj per

komputila reto. Malmultaj esperan-tistoj konscias kiel tiu reto ŝanĝos la tutan komunikan sistemon en la mon-do kaj la stilon de la homa vivo. Ĉu la mondo retkomunikos ankaŭ per E-o, tio dependas ne de registaraj dekretoj, sed de tio ĉu ni esperantistoj preparos Esperanton por la reto aŭ ne. Necesas laboregi, ne revii pri la *fin venko* kolerante ke la mondo estas stulta.

La celo de la internacia komunika-do estas interŝanĝi informojn, ne ven-gigi iun specifan lingvon. La homoj internacie interparolas ne por sur-tronigi la anglan aŭ Esperanton, sed simple por doni kaj ricevi novaĵojn. Gravas por ili ne la formo de komuni-kado, sed ĝia enhavo. Nur por ni, e-istoj, la lingvo gravas pli ol la enhavo de parolo. Niaj UK-oj estas grandaj teatraĵoj, en kiuj ni ludas je komuni-kado, sed efektive ne komunikas. Por ni tute ne gravas pri kio ni traktos en la kongreso, por ni gravas ke ni traktos per Esperanto. Tio donas al ni sub-konscie la impreson ke la tuta inter-nacia komunikado estas batalo de la ĉefaj lingvoj pri la lingva trono. Sed la rivaleco de la lingvoj estas afero akce-sora, kaj se ni faras el ĝi ĉefajon, ni falĉas al ni mem la kruojn.

Estas vero ke neniun lingvon scias ellerni ĉiuj homoj. Niaj eternaj komen-cantoj provas ke ankaŭ Esperanton ne ellernas ĉiu komencinto, eĉ malgraŭ sopiro kaj entuziasmo. Cetere, dum malsukcesi ĉe la angla aŭ germana ne signifas ke oni ne povas sukcesi ĉe Esperanto, tio tamen validas ankaŭ inverse. Nia lingvo ja postulas de ĉiu grandan derivan talenton, kiun ne ĉiu ricevis de la naturo. Mi konas sam-ideanojn kiuj scias aliajn fremdajn lingvojn pli bone ol Esperanton.

Sed la rezultoj de aliaj lingvoj provas ke lingvo povas esti *grava kaj utila* eĉ se nur kelkaj procentoj de la lernantoj havas pri ĝi sukceson. Ni povas vidi ke, malgraŭ la giganta instruado de fremdaj lingvoj, la *pli granda parto* de la socio ne kapablas fremdlingve komu-niki, aŭ nur tre primitive. Sekve E-o ĉiam povas utile servi al tiu pli granda parto de la homaro. Sed ĝi devas servi, ne venki kaj perforte trudiĝi.

Se ni kreos komunumon kiu scios efektive uzi E-on en la praktiko, ĉiam pli multaj personoj deziros aparteni al tiu komunumo. Neniam ĉiuj homoj — sed ekzistas ja nenia homa inventaĵo kiu ĝuus centprocentan sukceson.

Miroslav Malovec (Ĉebio)



• Brazilo: Retkurso lanĉita

Fine de julio Kultura Centro de Esperanto (Campinas) lanĉis deklacionan bazan E-kurson por portugallingvanoj en Interreto, adaptitan el franca versio. Post kvar semajnoj estis jam 20 aliĝintoj kaj eĉ kelkaj diplomitoj. Portugallingvanoj kun retaliro estas petataj volontuli kiel korektantoj. Kunordiganto: d-ro José J. Lunazzi, ✉ kultura@turing.unicamp.br; <http://www.aleph.com.br/kce>. (J. Rezende Piton)

Pli ol 30 jarojn daŭras jam la regione aŭdeblaj E-elsendoj de Radio CBN Clube en Sorocaba, ĉiusabate de 20.00 ĝis 21.00 (1080 kHz). (M.B. Garcia)

• Ĉinio: Librejo Verda Majo

La 19-an de aprilo ekfunkciis en Shenyang (provinco Liaoning) librovendejo kun la nomo de la fama japana esperantisto Verda Majo. La fondinto, Li Liang, vendas eldonaĵojn ĉefe en Esperanto, la angla kaj la japana. (*El Popola Ĉinio*, Yu Tao)

• Danio: Kultura malfasto

La varmaj ritmoj brazilaj de Flávio Fonseca (dekstre) kaj la naive plaĉaj ritmoj de Afrika Espero elektrizis la ĉ. 200 partoprenantojn de la 5-a Kultura E-Festivalo, inter la 6-a kaj 11-a de aŭg. en Kopenhago, eŭropa kulturĉefurbo de 1996. Furoris la Literaturaj Kafejoj, vizitataj de renomaj verkistoj kiel István Nemere, Spomenka Štimatec kaj Poul Thorsen. Nia raportanto, Joxemari Sarasua el Eŭskio, aldonas rilate al la danaj manĝkutimoj ke la moknomo de KEF, Komuna E-Fastado, estas nur vipurlanga kaj senbaza onidiro.

• Italio: Zamenhof-strato

En ĉeesto de la vic-urbestro de Vicenza, de la pola komerca konsulo el Milano kaj de esperantistoj el pluraj

urboj, oni inaŭguris la 19-an de majo longan straton L. L. Zamenhof en la industria kvartalo de Vicenza. (*L'Esperanto*)

• Japanio: Venena kongreso

Kolektiva manĝveneniĝo, t.n. enterito vibria perturbis la 83-an Japanan E-Kongreson (9-11 aŭg., Hiroŝimo). El la ĉ. 300 partoprenantoj 70 toksigis, inkluzive de alilandanoj, kaj 56 devis enhospitaliĝi. Feliĉe, ĝis la 13-a ĉiuj forlasis la malsanulejon. La gazetaro kaj televido raportis pri la novaĵo, mirante pri la multnacieco de la pacientaro. En la kongreso, la ĉijara Premio Ossaka estis aljuĝita al YAMAZOE Saburō, por lia por-Esperanta agado en medicino, precipe en Universala Medicina E-Asocio. (*La Revuo Orienta*)

• Kroatio: Albanaj gastoj

Komence de julio, grupo de esperantistoj kun sia instruisto Bardhyl Mezini vizitis Zagrebon kiel gastoj de Kroatia Esperantista Unuiĝo. Ili partoprenis la Somerlernejon kaj ekzameniĝis. (*ZET*)

• Kubo: 35-jara radio dankas

La 1-an de majo Radio Havano festis sian 35-jariĝon. Esperanto estas jam de sep jaroj ĝia naŭa lingvo. La kunlaborantoj dankas al ĉiuj esperantistoj kiuj ĝin subtenas.

La medicin-historia muzeo Carlos J. Finlay (Apartado Postal 70, CU-10100 La Habana) uzas Esperanton kiel laborlingvon kaj atendas esperantistajn vizitantojn. (M.A. González Alfonso)

• Madagaskaro: Konkurso por kursanoj

Universala Kultura Servo (No. 387 Cité Analamahitsy, MG-101 Antananarivo) organizas konkurson por la partoprenantoj de siaj Esperanto-kursoj. Ĝi zorgas pri diversaj premioj — i.a. vojaĝo al eksterlanda E-kunveno — por la klubo kiu havas la plej multajn Esperanto-parolantojn, por la klubo de la plej bona kandidato, kaj por tiu kandidato mem. (*Esperanto en Malagasio*)

• Nepalo: Elektiĝis fraŭlinoj

En Katmanduo Nepala Esperanto-Asocio (NEspA) aranĝis sian kvinan kongreson la 25-an de majo. Ĉefgasto Philip Pierce (usonano laboranta en Nepalo) parolis pri la signifo de “gasteco” en la nepala movado. Honorigon ricevis Shree Prashad Shrestha, prezidinto de Katmandua Esperanto-Societo. F-inoj Maya Rai kaj Ganga Malla elektiĝis kiel prezidanto resp. ĝenerala sekretario de NEspA. (M.R. Pathik)

• Sirio: Invito al E-turismo

Hikmat Maktabi, esperantista direktoro de la turisma agentejo Al Mukhtar en Aleppo (POB. 1084), deziras interŝanĝon de E-grupoj kun ĉiuj landoj. (*Heroldo*)

• Svedio: Teatra jubileo kun Muwanga

En 1996 sian centjariĝon festis, krom la E-teatro, ankaŭ la sveda vilaĝo Strömsnäsbruk — per naŭ prezentoj de la teatraĵo “Feliĉo sur reloj” de Sven Olof Lorentzon, pri loka striko en 1931. En la verko Esperanto ludas gravan rolon: al la vilaĝo venas s-ro Muwanga el Tanganjiko por prelegi pri ĝi. (Esperantistoj el foraj landoj efektive ofte prelegvojaĝis en Svedio dum la 30-aj jaroj.) La aktoro ludanta la rolon de s-ro Muwanga ne estas esperantisto, sed li klare parolis nur Esperanton dum la tuta tre ĝuinda prezentado. (A. Bergh)



Flávio Fonseca

Per- sone



• Albault: Festlibro preparata

Zorge de Reinhard Hauptenthal, pre-pariĝas festlibro por d-ro André Albault, prezidinto de la Akademio, kiu 75-jariĝos en 1998. Kontribuos i.a. M. Boulton, P. Daŝgupto, B. Golden, Li Shijun, G. Neves, B. Ragnarsson, YAMASAKI S. Interesatoj kaj enskribiĝontoj en la gratul-tabelon sin turnu al Iltis-Eldonejo (Pf. 600130, DE-66067 Saarbrücken, Germanio).

• Calment:

La plej aĝa homo — boesperantisto

Lastatempe oni diversfoje omaĝis al la supozate plej aĝa homarano, la 121-jara francino Jeanne Calment (1875-, Arlezo). En *Franca Esperantisto* Jean Amoureux malkaŝas ke antaŭ la unua mondmilito s-ino Calment bone konis la esperantistan vivon de Arlezo, ĉar ŝia edzo Fernand (mortinta en 1942) estis agema esperantisto. Ŝi rakontis pri tio vizitate de e-isto Jean Gauthier en 1988.

Ŝulco 90-jara

La 12-an de julio Rikardo Ŝulco fariĝis 90-jara. Frue konatiĝinte kun E-o, li tamen nur post emeritiĝo povis dediĉi sin, erudicie kaj plenakapable, al la lingvo de d-ro Zamenhofo. Studinte la strukturon de la planlingvo Esperanto, li aparte atentigis pri enradikiĝintaj malglataĵoj same kiel pri aktualaj devojiĝoj. Lige al la verkaro de L. Mimó Espinalt, li iniciatis la Skolon Analizan, kiu komprenas sin fidela al la dek ses reguloj de la Fundamento kiel baza kodo, insistante pri regula, “logika”, unueca Esperanto.

Tiucirilate Ŝulco havas internacian signifon por la tuta E-movado. Kiel

• Dix: Poŝtkartoj el milito

La germana pentristo Otto Dix (1891-1969) sendadis de 1915 ĝis 1918 soldatajn poŝtkartojn al Helene Jakob, junulino en Dresdeno. Sur la kartoj, videblaj en la urba galerio de Gera, legeblas multaj “Kara samideanino!” aŭ “Samideane salutas vin Dix”, sed ankaŭ pli longaj E-tekstoj. Dix kaj Jakob eble konatiĝis en E-kurso antaŭmilita. (*Dia Regno*)

• Kobayashi: Furoras IKU-prelego

Lekcio de Internacia Kongresa Universitato publikiĝis en ne-Esperantaj gazetoj: “Kial la aŭtoro A.C. Doyle malamis sian detektivon Sherlock Holmes?”, prelego de d-ro Tsukasa Kobayashi en Tampere (vd. sept. ‘95, p. 150), aperis en la sveda *Jury* kaj la finna *Ruumiin kultuuri*, en traduko de Kerstin Rohdin resp. de Jouko Lindstedt.



• Ngangu: Kvaronjarcento en Afriko

Gratulindas movada jubileo malofte en Afriko: la 53-jara Nduantoni Ngangu (plej dekstre sur la foto, en 1989) festas 25 jarojn da aktiva esperantisteco. UEA-delegito kaj fakdelegito pri instruado jam 23 jarojn, ekde 1977 li gvidas la E-movadon de la lando, kiel prezidanto de E-Instituto de Zairio (1977-90) kaj de Zairia E-Asocio (1990-). En 1987 li faris eŭropan vojaĝon kaj ĉeestis en la Varsovia UK kiel UEA-komitatano.

• Solo: Preĝeja premiero

La elektronika-simfonia muziko de la hispano Eduardo Vargas (Solo) estas konata en Esperantujo pro liaj kasedoj *Solo*, *Vulkano* kaj *Miraklo*. Solo, kiu inspiriĝas de ĉi-jarcentaj komponistoj kiel Bartók, Ligeti, Stockhausen kaj Rage, prezentis premiere la 5-an de junio en preĝejo de Malago la muzikaĵojn *Hotel Regina* “777” kaj *Demetrio kaj lia ŝipo*, kies tekstoj estas en Esperanto.

• Wells: Brita akademiano

UEA-prezidinto John Wells prelegis pri “Esperanto — ĉu ŝerco aŭ serioza ebleco?” en somera kongreso partoprenata de renomaj lingvistoj — kiel Joshua Fishman aŭ Richard Bourhais — ĉe la universitato de Santiago de Compostela (Galegio, Hispanio).

Wells estis elektita, la 4-an de julio, kiel membro (*fellow*) de la Brita Akademio. Ĉi tiu scienca societo, fondita en 1901, respondecas laŭ reĝa ĉarto pri la antaŭenigo de ĉiuj homsciencoj. Inter alie, ĝi selektas kandidatojn por ŝtata postdiploma stipendio.

“puristo” li ne ĉie akiris amikojn. Diversajn atakojn li devis travivi — kaj li brile refutis ilin. Sed ĉiam pli la esperantistaro konsciigas pri la Ŝulcaj postuloj pri regula, racia lingvaĵo.

En Germanio multajn anojn varbis lia pedagogie lertega libro *Mia amata Esperanto/Mein geliebtes Esperanto* (4 eldonoj). Atenton vekis, ne nur inter esperantistoj, lia libro *Europäische Hochsprache*. Krom la lingvosciencaj verkoj li multe verkis beletrajn, tradukis gravajn tekstojn, skribis poemojn — impona, riĉa rikolto de 25 jaroj da intensa, memdona laboro.

90-jara, Rikardo Ŝulco vige, atente, dialogeme daŭrigas sian verkadon, preparante ampleksan kompilaĵon de artikoloj pri kaj de si. Longe daŭru lia kontribuado al la Esperanta kulturo!

Franz-Georg Rössler (Germanio)



Ĉiuj veraj esperantistoj
abonas al la plej ofta E-gazeto

EVENTOJ

Ĉu ankaŭ vi?

pk 87, HU-1675 Budapeŝt, Hungario

Fake



• Arto: Teatra forumo

La 15-a Internacia Literatura Forumo en Eger (Hungario, 5-9 jul.), organizita de LF-koop kaj Esperanta PEN-Centro, estis dediĉita al la temo "Esperanto-teatro — cent jarojn poste". Pli ol 70 partoprenantoj el 8 landoj aŭdis prelegojn de Zofia Banet-Fornalowa, Belka Beleva, Georges Lagrange kaj Ljubomir Trifončovski. Spektaklojn prezentis i.a. Bulgara E-Teatro, Jerzy Fornal, Andres Bickel kaj Studio "P". Okazis diskuto kun lokaj verkistoj, la vicprezidentino de Hungara PEN-Centro, Éva Tóth, kaj hungaraj geaktoroj. Pri la evento raportis landaj ĵurnaloj, intervjuis lokaj radio kaj televido. (J. Felszeghy)

• Instruado:

Inkognita kursano Karlskoga

Dum la somera kurso (10-15 junio) ĉe la Esperanto-fako de Karlskoga

Popola Altlernejo la ŝtata sveda eduk-radio realigis kvin 20-minutajn programojn, elsendotajn ekde decembro. Redaktoro de la radio mem, Björn Adin, partoprenis la kurson kiel komencanto. Se la programo vekos intereson, la radio faros E-kurson. Dum la sama kurso profesia teamo realigis vidbendon pri Esperanto, laŭ iniciato de iama kursano, Viljo Mentu. Aliaj kursfinintoj de Karlskoga inkluzivas la TEJO-aktivulon Ralf Fröhlich (vd. maj., p. 84); Sara Karlsson kaj Andrea Forman, kiuj instruis po 6 monatojn en Bona Espero (Brazilo); kaj Ole Therkelsen, kiu mondvojaĝe prelegas pri Martinus-kosmologio.

Komerco: Esperanto ĉe internaciaj firmaoj?

En la Praga UK, 25 membroj de Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF) aŭskultis, en salono disponigita de la ĉefa filio de la firmao Bosch, klarigon de komerc-ĉambra reprezentanto pri la evoluo de la ĉefa ekonomio. Reelektiĝis IKEF-prezidanto Franz-Josef Braun kaj -estrarano Marco Picasso. Braun prezentis la ĵus aperintan *Sindikata Terminaro* kaj preskaŭ pretan novan

domstilon de IKEF. Estrarano István Gether lanĉis la ideon mendi studon de sendependa konsulta kompanio pri la enkondukebleco de Esperanto ĉe internaciaj firmaoj. André Ruyschaert (4, rue Théodore Eberhard, LU-1452 Luxembourg, Luksemburgio) serĉas komercistojn/ekonomikistojn por komenti pretan E-tradukon de la traktato pri Eŭropa Unio. (R. Rotsaert)

• Lingvaj rajtoj: Universala Deklaracio

En Monda Konferenco pri Lingvaj Rajtoj (6-9 jun., Barcelono), iniciatita de la Komitato pri Tradukarto kaj Lingvaj Rajtoj de PEN Internacia, oni akceptis Universalan Deklaracion pri Lingvaj Rajtoj, submetotan al baldaŭa Unesko-konferenco samtema. Partoprenis la e-isto Manuel de Seabra, Giorgio Silfer (Esperanta PEN-Centro) kaj Abel Montagut (kataluna PEN). La delegacio de Esperanta PEN-Centro subskribis la deklaron nur kun rezervo, ĉar tiu tezas nepran ligitcon inter teritorio kaj lingvo, nekongrue kun la realo kaj intereso de la tre multaj lingvoj sen teritorio, i.a. Esperanto. (H. Alos, *Contact Bulletin*, *Heroldo*)

Anoncetoj



Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas 1,60 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton por la ripeto de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj, bonvolu vidi la kolofonon ĉe la interna kovrilpaĝo.

Sonosteno estas la plej konciza fonetika skribo. Skribu kun 30 kurtigoj same rapide kiel vi pensas en Esperanto kaj nacia. Mendu lernolibron de UEA.

Por ekspozicio en la plej vizitata biblioteko de Belém (ĉefurbo de la amazonia provinco Pará), fine de novembro, bv. sendi poŝtaĵojn bele afrankitajn, E-filatelaĵojn, librojn, periodaĵojn kaj turismajn faldfoliojn al: Klubo E-ista Zamenhof, Lar de Maria,

Praça Floriano Peixoto, 33, BR-66090-290 Belém-PA, Brazilo.

Nova adreso de István Ertl: Kerkhoflaan 26 D, 3034 TD Rotterdam, Nederlando.

Kun tibetaj pilgrimantoj, bonzoj kaj vilaĝanoj vojaĝu 1700 km-ojn al Lhasa, tra regiono kun montopintoj nevenkitaj de la homaro ĝis hodiaŭ. Kontakto s-ron WANG Tianyi, Xi'an Esperanto-Asocio, Xiyinglu 74 hao, CN-710054 Xi'an, Ĉinio. ☎+86/29/321-21-71; ☎721-80-42.

Por serioza kolektanto mi vendas seriozan kolekton de E-insignoj (pli ol 400 pecoj). Detalajn informojn petu de Mikaleo Bronŝtejn, 6 Mikrorajon 1-17, RU-187500 Tihvin, Leningradskij obl., Rusio.

33-jara hungara viro deziras korespondi kun ekstereŭropaj leteramikoj pri kolektado. S-ro Károly Veres, Dohány u. 28. II/25, HU-1077 Budapest, Hungario.

Vizitu Maastricht Esperanto-Domo: tranoktado 35 gld pp fakso/tel +31-43-213.247; retpoŝto Adriaanse@GVO.RuLimburg.nl.

La adreso de Jorge Camacho en Jarlibro 1996 (p. 73) enhavas eraron: anstataŭ 19D devas esti 18D.

Esperanto-Klubo Brilanta Stelo havas propran poŝtkeston: P.O. Box 1413, Owerri, Imo State, Niĝerio.

Policisto, 47-jara, deziras korespondi kun policistoj de la tuta mondo. Eurípedes Alves Barbosa, QNL 05 Bloco B ap 107, BR-72150-050 Taguatinga – DF, Brazilo.

40-jara UEA-D/FD (lingvoj) dez. kor. ĉt. tm., ne nur Esperante, sed ankaŭ jide, hebree, ruse, pole kaj rumane. José Roque Sturza, C.P. 61, BR-97700-000 Santiago – RS, Brazilo.

Srđ ARANĜELOVIĆ (1920-1996) forpasis en Beogrado. Ekonomikisto, iam fakdelegito pri komerco, li ankaŭ kultivis beletron: vaste konatiĝis lia novelo *Sur dalmata fiŝistinsulo*, kaj lastatempe li preparis antologion de la serba poezio en la 12-a jarcento, kiun publikigos liaj kunlaborantoj.

Dilermundo de CASTRO (1915-1996) mortis la 23-an de junio en Rio-de-Ĵaneiro. Li vicprezidis, poste prezidis (1986-94) Kulturen Koooperativon de E-istoj en tiu urbo. En 1987 li estis la ĉefa organizanto de la landa kongreso kaj de jubilea festo ĉe la ĉi-urba Ŝtata Universitato.

Marcel ERBETTA (1911-1996) forpasis la 2-an de aprilo en Orvin (Svislando). Freinet-metoda instruisto kaj aktiva socialdemokrato, li lernis E-on ĉirkaŭ 1950 kaj baldaŭ iĝis konata pro la lanĉo de didaktike elstare signifanta interlerneja korespondado, "Grajnoj en Vento", kiun li gvidis dum dudeko da jaroj.

Pierre GUÉROUT (1911-1996) mortis la 22-an de aŭgusto en Le-Perreux-sur-Marne (Francio). Membro de Societo Zamenhof, inter 1974 kaj 1990 li estis unu el la reprezentantoj de UEA ĉe Unesko.

Girolamo LUCCHETTA (1942-1996) mortis aŭguste en Monastier di Treviso (Italio). Dumviva membro de UEA kaj de IKUE, li estis fakdelegito pri radio-aŭskultado: jam en la sesdekaj jaroj li surbendigis elsendojn el Varsovio. La ideo fondi en 1995 Amikaron de Esperanto en Radio ekestis el lia agado popularigi la Esperantajn radioelsendojn el Sarajevo.



P. M. MABESOONE (1901-1996) forpasis la 13-an de majo en Harderwijk (Nederlando). Ekde 1930 li plenumis dum multaj jaroj diversajn estrarajn taskojn en la tiam landa asocio La Estonto Estas Nia (LEEN), kies honora membro li iĝis en 1946. Komitatano de UEA inter 1953 kaj 1958, li oficis kiel ties estrarano pri financoj kaj administrado (1955-57), kaj kiel vicprezidanto (1956-57). Lia nomo estas ligita al la Mabesoone-fonduso, kiu subvencias gravajn agadojn en Nederlando.

Dušan MIRKOVIĆ (1924-1996), esperantisto dum 55 jaroj, iama komitatano de Jugoslavio Esperanto-Ligo, forpasis la 29-an de julio en Beogrado.

René W. PERRENOUD (1904-1996), esperantisto preskaŭ denaska, estrarano de Svisa E-Societo (1952-74), komitatano kaj librotenisto de Kultura Centro E-ista (1968-88), delegito dum 40 jaroj pri edukado, mortis la 30-an de julio en Hauterive (Svislando).

Adolf SCHWARZ (1906-1996) forpasis la 20-an de julio en Mainhardt (Germanio). Tutvive aktiva en la laborista E-movado, li e-istiĝis en 1925, tuj transprenante la kurs-estradon de nelerta gvidanto. En 1928-30 li gvidis E-kursojn en Svedio kaj migre vizitis e-istojn en pluraj landoj. En 1930-34 li aktivis en Berlino, i.a. fondante E-infangrupojn. En 1932 li verkis pri vojaĝo al Moskvo, Esperante kaj germane, la broŝuron *8 semajnoj en la lando de la Granda Plano*. Ĝisfine agema en Kolektivo E-ista Komunista, eĉ ĉi-jare li kontribuis al ties organo *Internaciisto*, kiun li en 1930 kunfondis. Lia libro *Survoje al Internacio de Proleta Esperantistaro* (1992) prezentas dokumentojn pri la ekesto (1932) de IPE, en kies preparlaboro li partoprenis.

Václav ŠPŮR (1915-1996), administrinto de la Somera E-Kolegio en Doksy (Ĉeĥio), honora membro de Ĉeĥa E-Asocio, forpasis la 15-an de julio.

OFICIALA INFORMILO

PATRONOJ DE TEJO 1996

Britio: Eric W. McCanlis. Germanio: August Franke. Israelo: David Petro Ŝamgar. Japanio: Yoriko Itō. Nederlando: E.C. Klaver; Nora Grooten.

SOCIETO ZAMENHOF 1996

Aŭstralio: Joyce Turner; Nassif Isaac. Britio: Eric W. McCanlis. Ĉinio: WANG Xue. Finnlando: Harri Tuomola. Germanio: August Franke; Helga Erhard. Hispanio: C. de Mosteyrín y Castillo; Josep Castelltort i Riba. Irlando: Seán Ó Riain. Japanio: Yoriko Itō. Korea Resp.: HAN Moo-hyup. Nederlando: Jan Otto de Kat. Norvegio: Kjell Peder Hoff. Rusio: Aleksander Korĵenkov. Svedio: Olle Olsson; Roland Lindblom. Svislando: Sylvette Randin.

DONACOJ 1996 (gld.)

ĝis la 31-a de aŭgusto

Fondaĵo Afriko: Anonime: 552,15. Britio: S. Sly 194,18. Francio: P. Chavignon

100,00. Italio: Milana E-Grupo 215,00; D. Trombetta 2388,60. Nederlando: W.P. Roelofs 600,00. Sumo ĉi-jara 10 943,54.

Fondaĵo Ameriko: Institucio Hodler: 2500,00. Donacoj dum UK Prago: 677,11. Brazilo: F. Fonseca 32,20; I. Sanguinetti 153,75. Finnlando: T. Sormunen 100,00. Nederlando: W.P. Roelofs 200,00. Venezuelo: J.E. Bachrich 50,00. Sumo ĉi-jara 4404,09.

Fondaĵo Canuto: Institucio Hodler: 2500,00. Britio: W.H. Simcock 10,00. Estonio: L. Jõumees 25,00. Francio: R. Picou 16,50. Germanio: P.W. Ruff 35,00; H. Schindler 100,00. Italio: D. Masterman 10,00; V. Di Tocco 112,64. Japanio (por aziaj e-istoj): M. Iwai 31,48; M. Saionji 31,48; K. Sanpei 31,48; M. Tahira 10,00; diversaj malgrandaj 7,87. Kanado: S.T. Norvell Jr. 50,00. Nederlando: R. Moerbeek 50,00; W.P. Roelofs: 200,00; B.M. Slösser-Bresler 50,00. Usono: A. Victor 20,00. Sumo ĉi-jara 8780,87.

Ĝenerala Kaso: Francio: G. Joris 57,12. Usono: T.A. Goldman 189,00. Diversaj malgrandaj 4,80. Sumo ĉi-jara 4514,49.

Konto Espero: Francio: R. Picou 33,00. Nederlando: D. Krombeen 50,00; W.P. Roelofs 200,00. Sumo ĉi-jara 1537,01.

Fondaĵo Oficeja Ilaro: Nederlando: W. Akkerman 450,00. Kanado: U. Ronald 21,80. Sumo ĉi-jara 471,80.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Aŭstrio: G. Cool 100,00. Britio: B. Clarke 15,00; P.A. Danning 100,00; W.H. Simcock 10,00. Finnlando: T. Sormunen 162,00. Germanio: M. Schäffer 26,00. Italio: D. Masterman 10,00. Japanio: M. Tahira 10,00; Z. Suzuoki 15,00. Kanado: S.T. Norvell 50,00. Nederlando: W.P. Roelofs 200,00. Sumo ĉi-jara 2789,67.

Volontula Fondaĵo: Brazilo: C.M. Lemos 150,00; Finnlando: J. Pietiläinen 50,00. Italio: D. Masterman 10,00. Japanio: M. Tahira 10,00. Sumo ĉi-jara 650,00.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

FRANCISCO VALDOMIRO LORENZ

BRAZILA ANTOLOGIO POEZIA

Societo Lorenz

Brazila Antologio Poezia enhavas 324 poemojn de 120 poetoj brazilaj de la 17-a jarcento ĝis nuntempe, elektitajn kaj tradukitajn de Francisco Valdomiro Lorenz. Eldonita de Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, Caixa Postal 3133, BR-20001-970 Rio de Janeiro (RJ), Brazilo. Prezo: 32 gld. Rabato de 50% por libro-servoj.

13-A INTERNACIA FESTIVALO



la populara jarfina aranĝo por familioj kaj personoj 25-55 jaraĝaj
27 dec. – 3 jan. en WÜRZBURG, Germanio
Temo: “popolaj kutimoj kaj tradicioj”
Inf.: H. D. Platz, fakso +49-5624-322
Adr.: Pf. 1148, DE-34303 NIEDENSTEIN



Institucio Hodler '68 akceptas pruntojn sen rento aŭ kun rento de 2% por investi profite al gravaj movadaj projektoj. Ankaŭ donacoj estas bonvenaj.

Pasintjare la subvencioj sumiĝis je 7000 gld. Informiĝu ĉe UEA!

La vivo de d-ro L. L. Zamenhof en bildoj



128-paĝa, grandformata (A4) bildlibro, per kiu Henk Thien (fondinto de la Foto-Servo pri Zamenhof) kondukas vin tra la vivo de la iniciatinto de Esperanto. 114 nigrablankaj fotoj kaj 25 mapoj, ĉio kronologie aranĝita kaj komentita. La libro celas esti utila dokumento, el kiu oni facile povas represi la materialon aŭ utiligi ĝin alimaniere.

Prezo: 30,00 (por Eŭropa Komunumo 31,80) guldenoj, plus sendokostoj. Mendu ĉe la Libroservo de UEA, kiu estas la sola distribuanto kaj donas trionan rabaton por ĉiu samtempa mendo de minimume tri ekzempleroj.

Stelo-moneroj denove haveblaj!

Universala Ligo transdonis al UEA la tutan restantan stokon de la stelo-moneroj, tiel ke la unika kolekto de tiuj numismatikaĵoj estas denove aĉetebla.



★ **Kompleto de stelo-moneroj.** Kvar moneroj de 1, 5, 10 kaj 25 steloj. Vidu apartajn priskribojn ĉi-sekve. **Prezo: 75 gld.**



★ **Monero de 1 stelo.** Bronza. Diametro 20mm., dikeco 1,5mm., pezo 3,4gr. Havebla nur en kompleto (vidu ĉi-supre).



★ **Monero de 5 steloj.** Latuna. Diametro 23,5mm., dikeco 1,7mm., pezo 5gr. **Prezo: 4,80 gld.**



★ **Monero de 10 steloj.** Kupronikela. Diametro 28mm., dikeco 2mm., pezo 9gr. **Prezo: 9,90 gld.**

★ **Monero de 25 steloj.** Arĝenta (90%). Diametro 38mm., dikeco 2,5mm., pezo 19gr. **Prezo: 60 gld.**

Triona rabato ekde 3 ekz. de la sama monero aŭ de 3 kompletoj. Aldoniĝas 10% por afranko kaj (por klientoj el Eŭropa Unio) 17,5% por imposto. Mendu ĉe UEA!

La granda kverko falis

“La Granda Kverko” falis. Kiam! Kiam ĉio ridetis ĉirkaŭ ni. Kaj puŝis nin iri antaŭen, ĉiam antaŭen, por grava idealo.

La idealo de Mirko Marçetta estis proponi modelon, modelon de “Granda Familio”, kiel mi skribis en mia artikolo, kiu aperis en revuoj italaj kaj Esperantaj, sub la titolo: “Ek ... al”.

Ĉio ŝajnis utopia al tiu kiu ne havis lian grandaniman koron. Li intencis akcepti ĉiujn, socie altajn kaj malaltajn, entuziasmiĝi al la Amo, al kunvivado kiel gefratoj, filoj de Patrino Naturo. La kunligilo estus la ideografia lingvo “Vidling” inventita de li, por kiu li laboris dum 14 jaroj kaj kiun li ne konsideris finita, ĉar li ĉiam aldonis novajn vortojn kaj esprimojn.

En lia hejmo de Fažana li starigis la unuan “Verdan Punkton”. Kion tio signifas? Tio signifas ke la HEJMA PORTO estas malfermita al ĉiuj, socie altaj aŭ malaltaj.

Multaj “Verdaj Punktoj”, dissemitaj ĉie ajn, estis lia revo, lia sublima atingo.

Intertempe li laboris kun la edzino Orsika — kiu kompletigis lin en la granda idealo, kundividita kun la patro Tihamér Kiss, granda helpanto de Mirko — por beligi kaj aĝrabligi la hejmon de Fažana. Nekredeble ke li tiom laboris je la lastaj tagoj! Mirinde, tiom estis grandaj la Amo kaj la Idealo.

Kaj hieraŭ matene, dimanĉe, forirante el Budapeŝto sub klara ĉielo, ni tri estis feliĉaj, niaj koroj batis harmonie.

Poste, kelkajn kilometrojn de la hejmo, de la unua “Verda Punkto”, kiam jam noktigis, lia vivo rompiĝis.

“La Granda Kverko” falis!

Fažana, 22.7.1996

LINA GABRIELLI

INDIVIDUAJ MEMBROJ HAVAS

OFERTO
Libroj kun rabato ĝis
60%!

AVANTAĜOJN

Ekskluziva oferto de interesaj kaj valoraj libroj por ĉi-
jaraj individuaj membroj de UEA: rabatoj kiuj repagas
vian kotizon! Decidu mem ĉu vi deziras ricevi nur
parton de via kotizo – aŭ eĉ jam tiun de 1997...

Esperanta Antologio. La plej
impona kolekto de originalaj poemoj.
900p. Bindita. 60 gld. **24 gld.**

Fundamenta Krestomatio. 18a eld.
de la klasika legolibro de Zamenhof.
464p. Bindita. 48 gld. **24 gld.**

Lingvo kaj vivo. Eseoj de Waringhien
pri Esperanto. 452p. Bindita.
48 gld. **27 gld.**

Metodiko de la E-instruado. Baza
gvidilo por instruantoj. 189p.
15 gld. **10 gld.**

Jubileo. Ilustrita memorlibro pri la
centjarigo de Esperanto. 164p.
48 gld. **18 gld.**

Proverbaro Esperanta. 2630 za-
menhofaj proverboj. 168p.
18 gld. **9 gld.**

La granda Meaulnes. Romano de
A. Fournier pri pura amo. 222p.
22,50 gld. **15 gld.**

Winnie-la-Pu. Aventuroj de la fama
urseto. Ilustrita. 173p. Bindita.
27 gld. **18 gld.**

Libro de amo. Erotika poemaro.
262p. 21 gld. **12 gld.**

Vetero kaj klimato de la mondo.
Abunde ilustrita popularscienca verko.
132p. 27 gld. **18 gld.**

Tiu ĉi oferto validas
ĝis la 31a de dec. 1996.
Mendojn bv. adresi al la Libroservo
de UEA, kun indiko de la kvantoj kaj
titoloj dezirataj. Aldoniĝas sendo-
kosto je 10% (minimume 5 gld.)
kaj, por loĝantoj en EU,
imposto je 6%.

Jen la plej

vaste legata junulara gazeto
rekomendinda por komencantoj
bela kaj moderna
diversa kaj amuza
interesa por ĉiuj

KONTAKTO estas gazeto
por ĉiu kiu serĉas interesan
legadon en Esperanto. Ĉiu
numero havas ankaŭ tekstojn
en tre facila lingvo, tiel
ke **KONTAKTO** estas aparte taŭga
por komencantoj kaj por
Esperanto-kursoj. Krome,
konkurso atendas vin en
ĉiu numero de la revuo!
En 1996 **KONTAKTO** aperos
6-foje. Abonu rekte de UEA
aŭ ĉe via kotizperanto.



ABONTARIFO 1996

Aŭstralio	31 dolaroj	Francio	125 frankoj	Nederlando	41 guldenoj
Aŭstrio	245 ŝilingoj	Germanio	37 markoj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	765 frankoj	Hispanio	2300 pesetoj	Pollando	20 guldenoj
Brazilo	20 guldenoj	Israelo	32 guldenoj	Portugallio	2500 eskudoj
Britio	16 pundoj	Italio	34000 liroj	Svedio	185 kronoj
Danio	150 kronoj	Japanio	2880 enoj	Svislando	31 frankoj
Finnlando	115 markoj	Kanado	31 dolaroj	Usono	23 dolaroj

**Granda rabato por grupaj abonoj
ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!**

LA NOVA REALISMO

de Bruno Vogelmann

185 p. 19,80 gld. Pri Nova Pensado, Religieco
Novstila, homaron unuiganta mondkoncepto.
Premio Deguĉi, Premio FAME. Tradukita en
26 naciajn lingvojn. Havebla de ĉiuj libroservoj.
El nepagipovaj landoj skribu al la aŭtoro,
pk 1564, DE-74555 Crailsheim, Germanio.

Gesamideanoj!

VIA PROFESIO interesas nin. Indiku ĝin al ni!

TAKE – LA DOMO
RN 83 – Rue de Tiefenbach
FR - 68920 WINTZENHEIM

Donaceto atingos vin!



Por esti ĝisdata pri la
evoluo kaj faka literaturo
de interlingvistiko kaj
esperantologio

INFORMILO POR INTERLINGVISTOJ

Jara abono (tri n-roj po 16p.) 10 gld.; EU-landoj 10,60 gld. Abonu ĉe UEA.

Language Problems & Language Planning

Journal of the Center for Research and
Documentation of World Language Problems

La problemoj. La solvoj.
La rolo de planado
en la homa komunikado.
Kaj la kontribuo de Esperanto.

Redaktas: Probal Daŝgupto,
Klaus Schubert, Humphrey Tonkin
Elonas: John Benjamins, P.O. Box 52519,
Amsteldijk 44, NL-1007 HA Amsterdam.

Aperas trifoje jare.
Individua abono: 77,00 gld.
Institucia abono: 167,00 gld.

Abonu pere de la Libroservo de UEA.